

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 26 (106)

MELBURNO

Jan. - Feb., 1962

LA DEKTRIA - KONGRESO — LA PLEJ GRANDA KAJ LA PLEJ ESPERIGA

ESPERIGA

Jen impresoj pri la 13a Aŭstralia E-Kongreso en Sydney 1-7 Jan., 1962. Aliĝis 165 anoj; partoprenis 117, inter kiuj troviĝis pluraj eksterlandoj. Vere esperiga por la estonteco estis la nombro da gejunuloj, kiuj ĉestis.

Ciuj Statoj estis reprezentataj, sed, pro la grandaj distancoj, nur malmultaj venis el Kvinslando, Suda kaj Okcidenta Aŭstralio. Multaj alvenis per la plej rekta kaj rapida transporto kaj restis nur tiel longe kiel sufiĉis por gravaj aferoj. Aliaj libertempuloj iom vagadis survoje. Pluraj okazigis kvazaŭ antaŭkongreseton en Canberra, kie ilin gastigis D-ro Ross Robbins, nia nova A.E.A.-Prezidanto.

La vetero en Sidnejo ne promesis bone por la kongresaj aranĝoj. Pluvigis, pluvegis, pluvetis. Pluvetis preskaŭ senĉese tiun dimanĉon antaŭ Novjaro dum lastalvenintaj kongresanoj sin loĝigis en hoteloj kaj viglaj Sidnejananoj bonvenige akceptis ilin ĉe stacidomo kaj aliloke, aŭ ilin gastigis en siaj hejmoj (pro kiuj varmigaj gestoj, Sidnejananoj, koran dankon!). Pluvetis ankoraŭ dum Novjarvespero, kiam amasiĝis la kongresanaro en Esperanto House (pri kiu, gratulojn. Sidnejananoj) por Novjarfesto kaj inter kona vespero—senĉesa babilado, gaja muziko, dancado, luksa regalo, Novjarsalutoj kaj bondeziroj—ĝojiga neoficiala komenco de la Kóngreso, spite de la vetero.

Kompreneble jam estis Novjaro, kiam aŭdiĝis "Bonan nokton", sed ankoraŭ mallume. Kia diferenco, kiam tagiĝis! Alvenis Lia Suna Moŝto por bene rideti sur la kongresajn aranĝojn dum tuta semajno.

Varia kaj bonege aranĝita estis la Kongresprogramo, el kiu pluraj okazaĵoj vere elstaris, kaj pro tio kaptis sufiĉe kontentigan jurnalistan atenton. Tiurilate, kaj, inter aliaj, pro la bone presita programo disdonita kun "The Australian Esperantist" pasintjare, apartan dankon kaj gratulon al la organiz-sekretario, F-ino Penny Ferguson.

Di-Servoj.

Digna komenco estis 2 Di-Servoj. Ĉe la unua, okazinta en St. James Anglikana Preĝejo, Pastro Capell, per profundpensa prediko, emfazis ke vivkondono necesas por harmonia kunvivado.

Sekvis rapida transportado al Mona Vale, kie en nova, impona, montsupra Baha'i Templo aŭdiĝis Baha'i Servo. Sanktajn Skribaĵojn laŭlegis S-inoj B. Jackson (Newcastle), J. Harvey (Canberra), B. Bennett (Manly) kaj A. Sedgley (Perth).

La Malfermo.

Mardon matene (2/1) okazis la Solena Malfermo en la belega halo de la Sydney E-Societo, S-ano J. Matsin, bonvenigis proks. 100 ĉeestantojn, kaj transdonis la prezidantecon al D-ro Robbins (Canberra), kiu oficiale malfermis la Kongreson.

Post legado de saluttelegramoj, A.E.A. - Sekretario, Herbert Koppel, citis la nomojn de niaj anoj mortintaj dum la lastaj 2 jaroj, kaj la kongresanaro honoris ilin per 2-minuta silento.

Sekvis salutoj de en- kaj eksterlandaj delegitoj. Profesoro In Ki Yang el Koreo, emfazante la neceson por neŭtrala lingvo, rakontis, ke nuntempe Nordkoreanoj devas lerni la rusan lingvon kaj Sudkoreanoj la amerikan. S-inoj Y. Canty kaj R. Aagard el Auckland salutis nome de la Nov-Zelanda E-Asocio kaj de la Auckland E-Societo respektive. Salutis ankaŭ S-ino Varkevisser en Nederlando, kaj sekvis ŝin la reprezentantoj de la Aŭstraliaj E-societoj: S-ino A. Sedgley (Perth), S-ro Rex Hanney (Adelaide), S-ro M. Leereveld (Hobart), S-ino M. Duncan (Manly) kaj S-ro K. Linton (Melbourne), kiu salutis ankaŭ nome de U.E.A. S-ro V. Gueltling salutis por S.A.T., S-ro V. Timmins por I.K.U.E. kaj S-ino I. Fink por Internacia Geografa Asocio.

D-ro Robbins mallonge alparolis la aŭdantaron pri la celoj de la Kongreso kaj esprimis esperon pri frukta laboro. Tuj poste aŭdigis "La Espero", kaj sekvis fotografado.

Urbestra Akcepto.

Samtage je la 3a, okazis en la urbdomo formala akcepto fare de lia Moŝto la Urbestro de Sydney, Skabeno H. F. Jensen. Post prezentado de ĉiuj kongresanoj kaj bona regalo helpe de urbaj funkciuloj, la Urbestro afable alparolis la vizitantojn, en kies nomo D-ro Robbins amuze respondis.

Labor-Kunsidoj.

Okazis 2 A.E.A.-kunvenoj kaj, po unu instruista, U.E.A. - kaj S.A.T.-kunsidoj.

D-ro Robbins lerte prezidis la A.E.A.-kunvenojn. S-ro H. Koppel donis la sekretarian raporton pri la agado de A.E.A. dum 1960/61. Li atentigis pri la granda laboro farita de S-ro Ralph Harry kaj bedaŭris ties rezignon kiel Prezidanto; li skizis la modelan laboron faritan de S-ino I. Milligan kiel ĉefperanto de nia Libro-Servo, de S-ro F. R. Banham kiel Redaktoro de nia gazeto kaj de F-ino V. Cox, kiu rapide ekspedas ĝin.

S-ro Ken Linton detale kasraportis. Kvankam niaj financoj estis tre modestaj kaj sufiĉis por nur 6-foja eldono de nia gazeto jare, la enspezoj superis iome la elspezojn. Li raportis ankaŭ pri la Ekzamen-Komitato sub la ĉiama instiga gvidado de D-ro C. Caldera (Perth).

Vigljaj diskutoj traktis pri la kreado de Informa Fako, pri Kongres-Regularo kaj pri Korespondaj Kursoj.

Kiel gvidanto de la nova Informa Fako elektigis S-ino Ruth McGrath (41 Reynolds Road, Mount Pleasant, W.A.). S-iaj kunlaborantoj, S-ro R. Hanney (Adelaide), S-ino F. Koppel (Melbourne), S-ino A. Douglas (Hobart), S-ro N. Gamble (Canberra) kaj S-ro F. Dunn (Sydney). Mankas reprezentanto en Brisbane.

Pasintaj kongresoj montris la neceson por aparta Kongres-Regularo. Tiun ellaboris S-ro H. Koppel laŭ U.E.A.-modelo kaj akceptis la Kongreso.

Oni ankaŭ decidis: Aranĝi Korespondajn Kursojn; plimultigi la stokon de la Libro-Servo; esplori importon de insignoj el Japanujo; duonigi la Ekzamen-kotizojn por junuloj malpli ol 18 jaroj.

Elektigis la nova estraro: Prezidanto: D-ro Ross Robbins (Canberra); Vic-Prezidantoj: S-roj I. T. Maddern (Morwell, Vic.) kaj M. Leereveld (Hobart); Sekretario: S-ro H. Koppel (Melbourne); Kasisto: S-ro K. Linton (Melbourne); Estrarano por Sydney: Volo Gueltling. La E-Societoj en Perth, Adelaide, Manly, Brisbane kaj Rockhampton rajtas nomi po unu estrarano se ili oficiale aliĝos laŭ par. 11 de la A.E.A.-Statuto.

Neniu loka grupo invitis la venontan kongreson. Brisbano, kies prezidanto S-ro Guenster promesis en Hobarto eblan inviton por 1964, sendis neniun delegiton, kaj S-ro Rex Hanney indikis ke Adelaide eble povos organizi kongreson nur en 1966. Fine, por ne interrompi la ĉenon de niaj kongresoj, Melburno konsentis organizi la venontan kongreso en Januaro 1964.

La S.A.T. kunvenon (5/1) prezidis la nova peranto, s-ano V. Gueltling, kaj s-ano M. Leereveld prelegis pri la celoj de S.A.T.



Ĉe la malfermo. S-ino R. Aagard salutas nome de la Auckland E-Asocio. Ĉe la tablo (maldekstre al dekstre) S-roj J. Matasin (Sydney), K. Linton (Melbourne), D-ro R. Robbins (Canberra), H. Koppel (Melbourne), S-ino Y. Canty (Nov-Zelando), Prof. In Ki Yang (Koreo).

La Kongresanaro.



The zinc plates for these Congress photographs were generously given by the Apex Engraving Co. Pty. Ltd., Melbourne, as a mark of sympathy with our movement, through our Treasurer, Mr. Ken Linton.

U.E.A.-anoj havis kunvenon (4/1), kiun gvidis la ĉefdelegito S-ro K. Linton.

La kunveno de la Aŭstralia E-Societo de Instruistoj (5/1) estis bonege vizitita. Prezistas S-ro M. Leereveld, kaj la ĉeestantoj varme dankis la ĉiam viglan Sekretarion-Redaktoron, S-ro I. T. Maddern, kiu estas nun estro de la Altlernejo en Morwell, Vik. Li promesis ankaŭ dum la venontaj 2 jaroj regulan eldonon de la organo "Klerigo". La kasisto (D-ro Fridenbergs) raportis kontentigan staton de la kaso kaj la societo nun havas 34 membrojn Prez., S-ino G. Pollard (Perth); Vic-Prez., S-ro M. Leereveld (ekde 1962 Melbourne); Sek., S-ro I. T. Maddern (c/o High School, Morwell, Vic.); Kas., D-ro A. Fridenbergs (Melbourne); Estraranoj, S-ro K. L. G. Smith (Sydney) kaj S-ro G. E. Lancaster (Hobart).

Prelegoj kaj Amuzvesperoj.

Ĉiutage okazis prelegoj. D-ro R. Robbins: pri Birdoj, Abeloj kaj Floroj. Per diagramoj li ilustris sian paroladon, ĉefe bazitan sur eltrovoj de botanikisto-monaho Mendel.

S-ro I. Maddern per amuzaj ekzemploj rakontoj montris kiel multaj "Nomoj de Homoj" devenas.

S-ro Kevin Smith, post plur-estas scii la ĝustan "Vortkategorion" por bona uzado de Esperanto.

D-ro A. Fridenbergs traktis pri Esperanto kiel Ideo kaj Realeco.

S-ro Keven Smith, reveninta plur-jara restado en Francujo, skizis novan metodon de Instruado de Esperanto en la Lumo de Moderna Lingvistiko.

Ĉiuvespere amuzoj! La "barbecue" kaj dancon (1/1) sekvis (2/1) lumbildparolado de S-ro J. Matasin pri "Vojaĝo en Eŭropo kaj Azio". Al la Varia Koncerto en Anzac House (3/1) kontribuis D-ro Robbins en sia neimitebla stilo, kiu kombinas E-propagandon, magiaĵojn kaj ŝercojn. S-ino Y. Canty el Nov-Zelando (4/1) priskribis lumbilde la Vivo(n) de la Maorioj. Sin sekvis amuzegaj prezentadoj de la E-propagandisto "Roso Robinso". La fina vespero (5/1)—altkvalita Koncerto de Klasika Muziko, lerte aranĝita de S-ino Mina Bedwell kun helpo de aliaj Manly-anoj.

Kongres-Servoj.

La glatiraj tagaj programoj, facilaj ŝanĝoj de prelegoj al kunsidoj, kaj

tre grave la kongresana tolero de la Sidneja malseka varmeco, ŝuldas multe al kunlaboro de lokaj gesamdeanoj, kiuj deĵoris ĉiutage por prepari kaj vendi malaltkoste en la E-Domo mem lunĉajn (kaj kelkfoje vesperajn) sandviĉojn, kun teo aŭ kafeo, kaj refreŝigajn glaciecajn trinkaĵojn.

Ĉi tiu servo kulminis Sabaton (6/1) post la fermo de la Kongreso en la korto de E-Domo, kie la kongresanoj ĉirkaŭis belaspektan bongustan bufedo—manĝon kaj gaja babilado moligis la dolorojn pri baldaŭa disiĝo. Apartan dankon al: Ges-roj Willis, S-inoj Bedwell, Carruthers, Matasin, Morrison, Parker, la tuta Feldmayr-familio kaj f-inoj Goulding kaj Rijs-wijk (la lastnoma ankaŭ pro multa laboro ĉe la Libro-Stando).

La Fermo.

Sabaton (6/1), antaŭ ol li oficiale fermis la kongreson, D-ro Robbins anoncis la rezulton de la Afis-Konkurso, kiu allogis 28 konkurantojn. Gajnis la premion (£10-10-0) S-ro V. Bourlin. Aliaj premiitoj estas. S-ino Sweeney (Sydney), F-ino Lyall (Melbourne), S-ro Capstick (2 afiŝoj); Infankelcio: F-ino C. Hartman (Sydney).

Poste D-ro Robbins dankesprime transdonis donacojn al la Organiz-Sekretario f-ino P. Ferguson kaj pluraj aliaj kunlaborantoj, kaj esprimis esperon revidi ĉiun en Melbourne en 1964.

Ekskursoj.

Nepre necesa enkonduko al la multaj vidindaĵoj ĉirkaŭ Sydney estas sendube ĝia mirinde bela haveno. Por ke la vizitantoj iom pli intime konatiĝu kun ĝia multmeĵla, golfetplena, monteta marbordo ili aranĝis boatan rondveturon posttagmeze de Novjaro. Varma sunlumo kontribuis al la perfekteco de la pejzaĝo, kaj neniu povis ne enamiĝi kun la rave blua haveno, sur kiu malrapidas diversgrandaj pramoj kaj super kiu leviĝas la impona pontego—ankaŭ kun la interesplena terbordo, kie natura vegetaĵo inter-miksiĝas kun homfaritaj ĝardenoj, amasiĝas domoj lerte konstruitaj por kapti ĉiun panoraman ekvidon. Tamen kelkaj pasaĝeroj trene konstatis, precipe apud la marenirejo, ke konatiĝo povas esti tro intima, kaj silenteme, eĉ iom sopire, ili reveturis al la kajo.

Iom norde de Sydney estas Palm Beach, tre apude de la Hawksbury-rivera elirejo. Tien la kongresanoj aŭtomobile ekskursis sabaton posttagmeze sekve de la fermo de la Kongreso (6/1). Veturante laŭ la marbordo, la pasaĝeroj ĝuis ravajn panoramojn de la Haveno kaj la Pacifika Oceano. Post tetrinkado en Palm Beach-restoracio, ili revenis tra plaĉa kampara rezervejo kaj fine reeniris la urbon ĝustatempe por bedaŭre adiaŭi kelkajn forveturantojn.

Gastiĝo en Manly.

Dank' al la ĉarma gvidagado de S-ino M. Duncan, la Manly Esperanto-Klubo estas nuntempe nia plej vigla grupo. Ĝia kontribuo al la ĝenerala laboro por la Kongreso estis granda kaj grava, el ĉio vere elstaraj estis la aranĝoj por Dimanĉo, la 7a, la lasta tago de la Kongressemajno, kiam tutan ĝoplunan tagon la vizitantoj pasigis inter la Manly-anoj kiel ties gastoj.

Ankoraŭ la kaprica Sidnejo vetero bene favoris; blue ridetis la ĉielo kiam jam je la 9.30a kongresanoj eniris pramon survoje al Manly; brilgaje dancadis la bluegaj ondetoj dum la transiro de la haveno; kaj alloga aspektis Manly mem kun siaj konstruaĵoj kaj pinarboj kontraŭ bluĉiela fono. Sur la kajo Manly-anoj bonvenige akceptis la vizitantojn, kies gaja babilado agrable forpasis mallongan marŝadon al la Urbdomo, kie la homamaso pli kaj pli kreskis.

Endome lia Urbeŝtra Moŝto, Skabeno J. W. A. Paton, akceptis, afable alparolis kaj poste regalis la Kongresanojn, kaj Skabeno F. Preacher ilin alparolis en Esperanto. D-ro Robbins, nome de A.E.A. kaj de la Kongresanaro, respondis al Lia Moŝto anglalingve.

Sekvis esploro ĉirkaŭ Manly, kiu situas agrable sur mallarĝa landkolo, inter la haveno kaj la Pacifika Oceano.

Venis la lunchoro. Denove montriĝis rezultoj de la Manly-ana laboro. Tre luksa bufed-manĝo troviĝis en iu urbdoma ĉambrego, kie portempe malpli aŭdiĝis la voĉoj dum ĉiuj ĝis sato manĝadis.

Ĉu nun finiĝis la penoj de la gastamaj Manly-anoj? Tute ne! Sekvis posttagmeza rondveturo de vidindaĵoj en privataj aŭtomobiloj; vespera gastigo en la hejmo de S-ino R. Caruthers; plua regalo, muziko kaj

kantado. Nur malfacile kaj nefeliĉe retiriĝis la forvojaĝantoj, kies foriron taŭge, kvazaŭ simbolo por nevideblaj larmoj, akompanis la reveninta pluvo.

Pro ĉiu plezuro, Sidnejanaj kaj Manly-anoj, grandan dankon. Ĝis revido en Melbourne, 1964.

● **PERTH:** 21 E-istoj kunvenis 15/12 por festmanĝo ĉe la Reĝa Hotelo en Perto. Poste 28 personoj pasigis ĝoplunan vesperon ĉe la Women's Service Guild ĉambro en Okcidenta Perto, kie montriĝis filmoj pri Berlino—Okcidenta kaj Orienta—klarigitaj de S-ro Goldman kaj lia filo. Sekvis belaj kantoj de S-ro Bartoli kaj S-ino Boundy, kiujn akompanis fortepiane S-ino Carmody. Pro tiel bona programo ni ŝuldas multon al D-ro Einihovici.

Ĉarman kaj popularan eksperimenton faris S-ino Pollard. Ŝi kuiris belan festkukon kaj ornamis ĝin per Verda Stelo kaj la devizo "Vivu Esperanto" sur blanka fono. Po unu ŝilingo por peco ĝi furore forvendigis profite al la Ligo. Ni dankas kaj gratulis al nia entreprenema samideano.

● **MANLY:** E-Klubo kunvenas je la 2.30 p.m. ĉiun 3an dimanĉon en la monato ĉe la hejmo de S-ino Mina Bedwell, 5 East Esplanade, Manly. Vizitantoj estas ĉiam bonvenaj. Sek.: S-ino B. Cleminson, 20 Sturgess Avenue, Harbord.

En Novembro, S-ro J. Matasin prelegis kun lumbildoj pri Norvegujo. Svedujo kaj Jugoslavio. En Decembro, por Zamenhofs Memor-Tago kaj Kristnaska Festo, parolis S-ro K. Smith, S-ro P. Schwerin kaj S-ro J. Matasin. La kursanoj de S-ino M. Duncan dramigis du ŝaradojn. Solkantis S-ino M. Morgan. Sekvis Kristnaskaj ĝojkantoj kaj donacoj por ĉiuj. En Januaro, okazis societa kunveno ĉe la hejmo de S-ino M. Duncan. Gastigis S-ino Y. Canty el Nov-Zelando.

Ce Ekspozicio kaj Publika Kunveno en la Urbdomo, vendredon (12/1), parolis S-ro A. Rutland kaj S-ro K. Smith. Demonstraciis pri la taŭgeco de Esperanto kiel Internacia Lingvo S-ino M. Duncan kun la helpo de gesamideanoj el diversaj landoj. Ĉeestis 60.

Ekspozicio ĉe la Urba Biblioteko komenciĝis 15/1 kaj daŭris 2 semajnojn. Esperantistoj deĵoris ĉiun tagon por klarigi la montraĵojn kaj respondi

al demandoj. Ekspozicio de premiitaj afiŝoj en montro-fenestro sur "The Corso" (Manly) daŭris 3 semajnojn.

Aperis ĉiusemajne artikolo en "Manly Daily" sub la rubriko Esperanto Corner. Jus finiĝis serio da 30 lecionoj. Nun regule aperas aktualaj aferoj, komentoj ktp.

Oficialaj kursoj ĉe la Vespera Kolegio, Darley Road, Manly, kie la instruistoj ricevas salajron de la Eduka Departamento de Nova Sud-Kimrujo, okazos de Februaro ĝis Majo, 1962, kiel jene: 3 kursoj, komencanta, progresata kaj altgrada, gvidataj de S-ino M. Duncan, S-ino K. Schwerin kaj P. Schwerin.

—M. Duncan.

● **HOBART:** Ni okazigis nian jarkunvenon antaŭ la jarfino (10.12.61) pro la baldaŭa foriro de S-ro Leereveld, kiu rezignis la Prezidantan oficon pro tio ke li estis forironta por loĝi en Viktorio. Lian rezignon ni akceptis kun bedaŭro. La nova estraro estas Prezidanto: S-ino A. Douglas; Vic-prezidantoj: S-inoj G. Cooper kaj M. Shankley; Sekretario: S-ro E. Bantick; Kasisto: S-ro G. Cooper; Libroperanto: S-ino Cooper; Bibliotekisto: S-ino Smith.

Ni festis (19/12) la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof. Post gaja programo, muziko, ludoj ktp., ni devis adiaŭi Ges-rojn Leereveld kaj tre malĝojas perdi ilin el inter ni. En la lastaj 5 jaroj S-ro Leereveld estis nia Prezidanto, kaj li kun sia edzino ĉiel helpis kaj instigis nin. Responde adiaŭan parolon S-ro Leereveld diris, ke ili malĝojas forlasi nin. Kun ni ili ĉiam sentis sin inter amikoj, kaj ili esperas viziti Tasmanion de tempo al tempo.

Ni kutimis kunveni ĉe la hejmo de Ges-roj Leereveld; de nun ni konvenos ĉe la fako de Edukado por Plenaĝuloj, 85 Elizabeth Street, Hobart, la unuan Dimanĉon en ĉiu monato, posttagmeze. Ni esperas komenci novan kurson en la nova jaro.—Aldo.

● **MELBOURNE:** 56 personoj kolektiĝis 15/12 en la Esperanto-Centro por festi la naskiĝtagon de la Majstro. Ges-roj R. Laidlaw kantis kaj pianludis, f-ino Elsie Godfrey legis monologon, S-ro H. Koppel deklamis poemon de Julio Baghy kaj ĉefparolanto estis S-ro F. V. Taylor,

k'u parolis pri La Helpantoj de D-ro Zamenhof. Luksa vespermanĝo finiĝis sukcesan kunvenon.

● **CANBERRA:** Ni komencis elementan kurson kun 12 membroj. Ni studas la kurson Szilagyi. Kunvenoj: en ĉiu Mardo ĉe 97 Captain Cook Crescent, Narrabundah. Instruanto, s-ro N. Manitus, kaj ni ĝojas, ke s-ro R. Harry nin helpas.

—Jean Harvey.

ESEA KONKURSO PYKE

La Pyke-Memoriga Ekzameno provizore "dormas". Prenas ĝian lokon Konkurso pri Eseo, libera al ĉiuj legantoj de The A.E., kiuj komencis studi Esperanton ne pli ol antaŭ kvin jaroj. Reguloj:

(1) La eseo estu longa 500 ĝis 1000 vortojn, en klare legebla skribo, pri temo elektita de la partoprenanto. Lasu marginon unuoclan ĉe ĉiu flanko kaj spacon inter ĉiuj linioj.

(2) La partoprenanto verku la eseon en la daŭro de ne pli ol du monatoj de la dato sur la registra avizo.

(3) Premio £5 estos donita al tiu konkursinto, kies eseo la ekzamenistoj rigardos la plej bona. Ili pri-taksos la verkajon ĉefe pri klara esprimo kaj gramatika korekteco.

(4) Findato por la lasta registra enskribo: Septembro 1. Tio ebligas ricevon de la lastaj eseoj en ĝusta tempo (Oktobero 29), por ke la ĵugantoj faru sian taskon kaj preparu premi-donon au -anoncon) ĉe la Decembra Zamenhofa Festo en la koncernaj lokoj. Enregistriĝu nun, ĉe la Redaktoro.

Pri la A.E.A. (Normaj) Ekzamenoj vidu: The A.E.A., Jan., 1961.

D-ro PRIVAT SKRIBAS:

Responde al viaj tri demandoj en "The A.E." (Majo-Junio) (1) La menciita manuskripto (kraĵona) ankoraŭ kuŝis sur la skribtablo de D-ro Zamenhof, kiam mi vizitis l'an edz'non post lia morto, ĉar ŝi lasis ĉion netuŝita, sed (2) ŝi donis al mi la ms. por citi en mia biografio de ŝia edzo. Se vi deziras fotokopon, estas facile havigi ĝin al vi. Cetero mi intencas donaci tiun ms. al publika biblioteko, eble al British Museum en Londono. (3) D-ro Zamenhof mem skribis, ke lia patro estis ateisto.

Li eĉ skribis unue "liberpensulo" kaj trastrekis tiun ĉi vorton por meti "ateisto". Se vi legus atente lian broŝuron pri Homaranismo vi konstato, ke li insiste diferencigas inter hejma denaskiĝa religio kaj persona kredo. Li rimarkas, ke multaj personoj partoprenas ritojn au ceremoniojn eĉ se ili ne estas konvinkitaj kredantoj.

Kun amika saluto via fidela Edmund Privat (27/10):

LA SUPERA EKZAMENO.

En la Nov. - Dec. numero Fay Koppel faris plendon.

D-ro C. Caldera, la Komisiito por la Ekzamenoj, respondas: "Kiam oni starigis la Australiajn ekzamenojn, oni deziris ricevi specon de oficiala rekonno, kaj pro tio oni decidis akcepti normon identan kun tiu starigita de la Nederlanda Asocio, jam aprobata de la Akademiestro. Tiu sama normo regas eĉ multaj aliaj Esperanto-organizoj, kaj neniu konsideras ĝin tro alta. La Supera provo postulas fundan konon de la gramatiko kaj iom ĝeneralan scion pri la literaturo; la teknikaj tradukoj tute ne estas terura baro, ĉar Esperantistoj, kiuj volas kandidatiĝi por la provo, havas la rajton uzi librojn dum periodo dumonata kaj tiel ili povas plenumi plej facile la taskojn de ili postulitajn. Ĉiu klubo en la ĉefurboj posedas la bezonatajn teknikajn vortarojn, kaj oni povas pruntepreni tiajn librojn por la okazo de ekzameno. Aldone al tio, por izolitoj, la Komisiito mem povas doni helpon, pruntedonante la verkojn. Fakte, la celo de la provo estas: instigi la kandidatojn al studado, kaj, tute logike, la kampo de la studado devas esti iom vasta. La vera provo, ke la ekzamena normo ne estas tro alta, sidas en tio, ke ĉiuj tri kandidatoj, kiuj jam faris tiun ekzamenon, sukcesis kun honoro, gajninte poentaron superan je 80 p.c.

"Oni ne postulas por la Supera ekzameno verkadon de poemo, sed simplan tradukon de poemo, **ne necese en versformo**. Tio implicas simplan komprenon de la vera signifo de la versaro kaj ĝin tradukon en bonan Esperanton. La postulo de traduko versforma de poemo apartenas nur al la Klereca provo, kaj en tiu okazo la postulo ne estas

tro severa, sed kandidato al tiu alta Diplomo devas scii la teknikon de versfarado, eĉ se li ne havas la spiritajn ecojn de poeto."

Respondo de la Redaktoro: Estas diferenco inter nepresota provtraduko, kontrolota de ekzamenistoj, kaj tradukita verko destinita por vasta publika informo.

La provtekstoj teknikaj estas iloj, per kiuj la juĝantoj povas taksii la ĝeneralan kapablecon de kandidato—kiel tiu povas sin adapti al diversaj lingvomedioj kaj trovi ekvivalentojn por terminoj uzataj en nia multvaria moderna vivo. La ĉefa malfacilo en tio estas la manko de taŭgaj fakvortaroj je dispono de individuaj ekzamenatoj. Tamen D-ro Caldera jam proponis solvon de tio.

Fakte, en la **Klereca** ekzameno certe la plej malfacila tradukotajo estas ĝuste la literatura Angla—elektita el verkoj de Emerson, D-ro Johnson kaj simile neblesprimaj aŭtoroj. La teknikaj prezentas neniajn malfacilojn pri senco, sintakso aŭ arkaĵismo—nur la terminoj ĝenas (gonads, genes, take-over, chain stores, nitric acid k.t.p.) ĉar ili postulas la korektajn ekvivalentojn. La frazeologio estas klare esprimita, kontraste al la literatura.

Kromdire, estas malfacile distingi inter la teknikaj kaj la literaturaj tekstoj, ĉar en verkoj de Hardy, Hugo kaj aliaj troviĝas longaj paragrafoj, eĉ paĝoj, da pure teknika teksto pri arkitekturo, filozofio kaj simila fakŝtofo.

Kiom koncernas la Klerecan, la ekzamenantoj rajte povas postuli provon je la versfarado, ĉar la prosodio estas integra parto de la literatura lingvo. Mi ne supozas, ke simpla verstraduko estas ekster la kompetenteco de progresinta E-isto. Havante jam elementan senton pri la ritmo, li bezonas nur kapablon kalkuli piedojn kaj formi rimojn. En la Supera eĉ tio ne estas postulata.

Por reteni altan nivelon la Ekzameno devas elkribri ĉiujn krom la ĉiarilate plej bonaj E-istoj. Ne ĝravas la nombro, sed la kvalito.

Revene al la unua paragrafo, mi diru, ke nur fakulo traduku fakan verkon por publika distribuado. Sed ekzamena folio ne estas tia, kaj servas nur kiel medio per kiu oni

taksu la entutan kompetentecon de la provato sin esprimi en diversaj verkspecoj.

Povas veni tempo, kiam publikaj aŭtoritatoj bezonos helpon de E-istoj-tradukantoj en tiu aŭ alia kampo de la moderna vivo—arta, teknika, jura k.s. Ni devas ekzerci nin, prepari nin al tiu eventualo. Tial ĉiu batal-pretema sam-o havigu al si tiom da vortaroj ĉiaspecaj, kiom li nur povas.

Mi ne povas nuligi la diron de Fraser-Tytler, kiu miaopinie estas principe prava.

"BILD-LIBRO PRI BESTOJ."

"The Daily Mail" (London) has published a most beautiful book in Esperanto at the moderate price of 15/-. Of 78 pages (10½ x 13in.), it is richly illustrated with pictures of animals, insects, birds and fish; the embracive text was translated by Mr. Gething, aided by Messrs. Capp and Butler. The work is of the highest instructive and pleasure-giving value, and offers appeal to both junior Esperantists and those interested in sectional terminology. It will be followed by "Amuzo Per Scienco" (7/6), translated by Dr. D. R. Duncan, and others are promised if the market is there, as it should be. The prices quoted are in English. Postage 2/- extra. Order through our agent.

"Voĉoj de Paco."—Ĉiu virino, kiu deziras bremsi la al-inferan marŝon de nia nuklee-minacata mondsocio kaj turni ĝin en la vojon de l'paco, kontaktu kun Box 344, Oakville, Ontario, Canada. Ĝia 40-paĝa broŝuro enhavas riĉan raportojn pri la virinaj organizoj kun tiu celo, krom konservindaj paroloj de grandaj animoj, kiuj partoprenas ĝian idealon. Ĝiaj 4000 membroj principe aprobas Esperanton, kio konsiderinde diskonigas la lingvon ĉe Kanadaninoj. Skribu nun!

Unua Vojaĝo de Gulivero. Liliputo (Jonathan Swift). El la Angla trad. Ethel M. Prent. Eldonis F. Maitland. Prezo 6/8 Angla. Paĝoj 63.

"Gulliver en Liliputlando" estis eldonita en Londono en 1909, kaj "La Vojaĝoj de Gulivero" en Nederlando inter la du militoj. Ambau estis cen-

zure redaktitaj eldonoj, kaj la dua deviis de la originalo per nerajtaj aldonoj kaj alimaniere. Tiu ĉi traduko fidele sekvas la originalon, kaj ĝia lingvaĵo estas pure klasika. La preso estas admirinda, kaj ne troviĝas preseraroj.

La verko—ŝajne frukto de ĉagreno kaj animvundo—estas lerte maskita satiro, mokante naciajn kaj sociajn dogmojn kaj morojn. S-ro Ockey, en klartrafa antaŭparolo, asertas, ke kelksence ĝia aŭtoro heroldis la fantazian sciencfikcion, cent jarojn antaŭ Jules Verne.

Swift estas unu el la plej kompatinde tragikaj figuroj de la Angla literaturo. Lia perversa karaktero devigis lin kaŝi siajn virtojn kaj paradi siajn pekojn. Stile aŭ temperamentale li efikis sur grandajn verkistojn en postejaj periodoj.

Agentoj: mendu ĉe F. Maitland, 22 Hamilton Park, London, N5, au The Worker Esperantist, 27 Argyle Rd., Ilford, Essex.

La Verda Raketo: 150 p. De Jean Forge. Eld. KOKO. Randbolvej 4, Copenhagen. 30 steloj. Bindita.

Malnovaj legantoj ĝuos alpreni ĉi-verkon de aŭtoro de bone konataj antaŭmilitaj originalaj romanoj. Espereble ankaŭ novajn li gajnos per la jena naŭo da spritaj prozaĵoj. "Metempsikoza Aventuro" temas pri viro reenkarniginta sub formo de siahejma hundo. "Nia Nigra Filo" bonhumore petolas ĉirkaŭ la persono de Afrika samideano, Kola Ajayi—kiu certe plengorĝe ridas kun la ĝenerala publiko, por kies amuzo li volonte servas kiel "mokfiguro". Estas nepre notenda, ke tiu Nigeriano estas meze klera homo, kiu E-iĝis 1931 en Polujo pere de la fratoj Fekte (Forge). Depost 1932 li vaste prelegis en E-o tra centra Eŭropo kaj ricevis impresan publicon. Legu do la lertan fikcion kiel bonhumoran amikajon, kaj neniel acidan.

"Tunelo de Kisoj", revoj el taglibro de kisat-ema junulino, por kiu—sufiĉe strange—fervojoj tuneloj prezentas sopiratan oporuton pli intime konantigi kun lipharaj buŝoj. Ankaŭ la ceteraj provizas agrable fluan legadon. La malnova majstro ne perdis sian virtuozon.

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15\$ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 27 (107)

MELBURNO

Mar. - Aprilo, 1962

PEDAGOGUES PARLEY IN PERTH

Conference of Modern Language
Teachers of W.A.

It met in the University of W.A. on Nov. 25 last. Dr. Christine Morrow, in urging foreign language study, said we must learn to "think beyond the tribe"; such study "introduces us to ways of thought other than our own . . . gives greater understanding of literatures other than our own . . . increases our understanding of our language . . ." To which some might have felt: "There's all too little thinking **within** the tribe; for witness, the chaotic narrowmindedness that rules even in one-language social groups. I'm afraid "thinking outside the tribe,—'gaining another soul by learning another tongue'—sets a grade the hope of attainment of which seems, for most of us, pretty premature. Let's first learn to equilibrate, among those we know, the soul we already have.

And is not knowledge of our own language and literature best gained by studying the texts of its past periods? For the rest, even modern English literature is unknown to the vast majority of us.

For those psychically ready for such expansion, Esperanto aids appreciably in "thinking outside the tribe" and gives access to a far wider field of humanity than does the acquiring of a national language. It enables us to converse with, say, a Bulgarian postman, a Finnish pro-

fessor, a Rumanian journalist, a Japanese clerk or student, and so on through sixty lands. Scope enough here surely for the individual intent on getting insight into the thought processes of other nationals.

We leave to specialists to conjecture why spokesmen for this professional body still know nothing of the increasing interest in Esperanto shown by their more progressive colleagues abroad. In a five-language folder published last year, for instance, some 50 high-ranking scholars in Britain and the Continent favored Esperanto and addressed their findings to "all students and academic staff". Waringhien (Paris), Collinder (Uppsala), Manders (Utrecht), Collinson (Liverpool), and several Slav and Oriental professors are among those who support the movement for a neutral planned language. Our local erudites might look into this and similar evidence.

"Criticism" of Esperanto comes in the main from those who have not studied it. Suspect is the scholar who has learned it—for he is an "Esperantist", and so condemned out of hand. "The ears of the deaf shall be unstopped"; of the unwilling to hear, too, we trust. But the prophecy is set in a sadly remote context.

. . . "Mrs. Pollard suggested the possibility of introducing language to children by the regular and useful artificial language Esperanto, which was, moreover, an instrument of international goodwill.

"Mr. Roberts agreed that this (?) was true, but pointed out that it lacked the value of a natural language in that it had no tradition and no literature. Moreover, it was Latin-based, whereas many world languages (?) are not. . . ."

In point of fact, Esperanto has a tradition of over 70 years of orderly evolution. Its earliest texts are as easily read as its latest. Its literature is at least proportionate to its relatively short history, and is comparable with those of some of the smaller nations; and though its vocabulary is largely Latin-based, it is agglutinative in character and so has affinity with several non-Aryan language groups, of which it represents an ideal linguistic type. With its facility for word-building from radical elements it is closer to Greek, German, Turkish and Hungarian than to Latin. Its agglutinative genius makes appeal to non-Aryans, who recognise in it similarity with their own.

For the record, the proportions in terms of internationality for 4155 roots are: French, 91.6; English, 89.5; Italian, 88.9; Portuguese, 87.8; Spanish, 87.1; German, 75.7; Latin, 64.7; Russian, 53.3 ("The British Esperantist", July, 1952).

These things are overlooked, ignored or unknown by Mr. Roberts, who favors for international communication—the TRANSING numerical method.

There was the usual talk of the "intellectual discipline" to be derived from the study of Malay, German, Latin and so on, but any such advantage may be obtained at least equally through Esperanto, by reason of its structural simplicity, phonetic regularity and fixed accent stress. Uninhibited by fear of misuse of case and gender, the learner gains early confidence in speaking it. It is at least five times easier than a national tongue, to which it might serve as a stepping stone; when learned, it can be used to contact adepts in all countries, inter alia for mutual help in language study.

Leaving surmise to confront realities, speakers had "moments of truth" and became revelatory, one remarking that seven years of instruction in German had left him with little facility in speaking. Prof.

Austin suggested that he reside in a German-speaking country till he could drop the "little", and instanced (somewhat inappropriately) that his own 30 years' study of ancient Greek had not enabled him "to speak it". "However," he added consolingly, "skill in conversation is only one aspect of proficiency".

From the discussions, we gather that the M.L.T.A.W.A. has, academically considered, a lot of trouble on its plate, and after much parley about it and about, the bemused auditors, Omar-like, "came out by the same door as in they went".

—F. R. Banham.

EDUCATION: v. p. 150

The campaign: Esperanto in the Schools has begun to show results. In 1959-60 Esperanto was taught in 380 schools in 30 countries; pupils, approx. 14,000. Yugoslavia gave best figures: 172 schools with 5257 scholars, but it is desirable that other lands proportionately match up to this. Today there are encouraging signs of such being done. Denmark has introduced Esperanto as a voluntary subject in the 8th and 9th forms. Prof. I. Lapenna addressed 12 teachers' colleges and was heard by 2100 pupils and 130 teachers. In France, 1961-2, Esperanto will be taught as a compulsory subject in 19 teachers' colleges, and last year it was taught in 35 lycees and technical schools. In New Zealand Hawera Intermediate School has Esperanto as a normal part of its syllabus. Address of The N.Z. Esperanto Teachers' Assoc. is P.O.B. 181 Upper Hut.

Those desiring to keep informed on this and other matters concerning Esperanto progress would do well to subscribe to the richly documented and moderately priced: The Worker Esperantist, 27 Argyle Road, Ilford, Essex; and Informilo de Internacia Esperanto Muzeo, Hofburg, Vienna.

Dr. F. G. Spurdle, M.A., Dip.Ed., Ph.D., of Queen Elizabeth Technical College, Palmerston North, N.Z., declared to a Rotary gathering that Esperanto filled all requirements and should be made a subject for School Certificate and University Entrance.

SCIENCE AND ESPERANTO

Dr. W. F. Harris, D.Sc., of New Zealand, received from Gunma Univ., Maebasi, Japan, an original science article written in Esperanto by Prof. Shoichi Hori. There was no indication to the recipient that the International Language was used. Dr. Harris, who is a polyglot, learned some Esperanto about 30 years ago, and found that he could read the article at sight even after such a long lapse of time. To the editor of the N.Z. E-ist he spoke of the increasing use of the language in scientific circles and expressed the belief that the adoption of Esperanto by scientists would be a simple solution of their language problem.

"As for me, I can assure you that, asked for my opinion, I shall ever give my full support to the international language."—Dr. Tadeusz Kotarbinski, president of the Polish Academy of Sciences (p. 29, "Esperanto," Feb., 1962).

"ORVELKI"

Fab. de Andersen, vol 1, p. 97/3: "Vi ankaŭ devas orvelki, vi kompatinda floreto!" Kiom da legantoj rimarkis kaj cerbumis pri tiu stranga verbo? Tre amuza estas la klarigo, donita de Waringhien en "Eseoj", p. 70. Li konfesas, ke li estis naiva, kiam li rikoltis tiun belkoloran "orvelki" per kiu, kun junula orgojlo de skolto-esploristo, li rapidis ornamo la artikolon "oro" de la Plena Vortaro. Jen la difino, kiun li lerte prikonjektis: orvelki—iĝi orkolora pro velkiĝo. Sufiĉe prudenta provo!

Sed lia genio estis vana, ĉar Wm. Bailey avertis lin poste, ke, laŭ la Dana teksto, tiu ora velkado estas nur alia fantazio de la Demono de la Preseraroj, kiu ellasis la komencan "f" antaŭ la pli proza "forvelki".

Kio ne estas tiel amuza estas la fakto, ke la erara vorto kun difino ankoraŭ restas en la lasta (kvara) eldono de la P.V., por generi senfinan kapgratadon al milmiloj da studentoj.

Tutmonda Esp-isto Junulara Organizo (TEJO). Informative report, in English, of the 17th congress at Wokingham (Berks), 12-19 Aug., 1961. Copy from B.E.A.

Australia Kroniko

SYDNEY: (Nov. - Dec.) Du aferkunvenoj (6/11, 4/12). La dua elektis novan prezidanton: S-ro Matasin, por anstataŭi S-ron Drake, kiu jam rezignis. Prelegis S-ro V. Guelting (13/11) pri Bestoj, Homoj kaj Insektoj; F-ino R. van Ryswyk (20/11) pri sia vojaĝado, kiam ŝi iris al SAT-kongreso en Danlando; kaj S-ino L. Tobin (28/12) pri sia vizito dum la jaro al Japanujo. Debatespero (27/11), kiam, unue, S-ro F. Dunn kaj F-ino van Ryswyk debatis: ĉu ni preferu rektan aŭ nerektan metodon por instrui E-on? kaj, due, S-ro R. Asselin aprobis kaj S-ro V. Bourlin malaprobis elekton de "Miss Australia". Sonbendprogramo (11/12): preletoj de E. Privat pri internacia kunvivado kaj prelego de C.W.M. Baans pri la vivo de Ĉajkovski. La Kooperativa Komitato organizis bazaron (25/11), enspezante £68. Societa vespero (2/12). Ni celebris Zamenhof-vesperon (15/12) per preletoj, kantoj kaj poemdeklamoj. S-ro Guelting anglalingve festparoladis.

(Jan.-Feb.) Jan. 1-7 ni gastigis la nacian kongreson, pri kio raportoj jam aperis. Kiam ni diskutis la spertojn de la kongreso (22/1), okazis kritikoj pri organizaj detaloj kaj farendajoj nefaritaj; almenaŭ unu plendis, ke ne sufiĉe ofte migrintoj prelegis, sed ĝenerale oni aprobis la rezultojn. Post la kongreso (15/1) niaj vizitantoj novezelandaj faris programon: S-ino Canty parolis pri la Maorioj, S-ino Aagaard, pri E-o en Nov-Zelando, kaj ambau ludis teatraĵon. Amuzvespero okazis (3/2), aferkunveno (5/2) kaj, pro nealveno de la prelegonto, alia aferkunveno (19/2). D-ro Wouters komencis instrui novan merkredan kurson por komencantoj (7/2) en la klubĉambro. Ĉe la jarkunveno (26/2) ni plejparte reelektis la malnovan estraron: Prez., J. Matasin, sek-io Rita van Ryswyk, kasisto F. Dash kaj aliaj. F-ino van Ryswyk estris Forumon (29/1), kiam po du viktimoj klerede diskutis demandojn de ŝi proponitajn. S-ro V. Bourlin prelegis kun lumbildoj pri sia ekspedicio al la Himalajaj Montaroj (12/2).—F. M. Dunn.

BRISBANE: Ĉar multe da anoj ferie forestis dum Decembro, la Zamenhof Festo okazis ĉe Ge-sroj S. H. Beck, kiuj gastigis proks. 25 personojn. Pro tiu plensukcesa Festo ni ŝaldas al Ge-sroj Beck, S-inoj Norman, Gunster kaj Grant. Kantoj en E-o de S-ro Norman, kaj pianludo de S-inoj Beck kaj Norman.

En la Brisbana kunveno Ge-sroj Grant, S-ino Beck kaj S-roj Gunster kaj Norman gvidas 30 lernantojn.

S-ino V. Fraser, UEA-del. ĉe Redcliffe, ĉeestis la Kongreson en Harrogate, kie ŝi partoprenis la kurson de Pastro Cseh (ĉe). Pro sukceso en tiu kurso ŝi ricevis atestilon pri kapableco.

En Rockhampton S-roj Petley kaj Russell instruas al 60 homoj, ĉiun semajnon en la ĉambro de la Fako de Edukado por Plenaĝuloj. La movado multe ŝaldas al S-ro Petley pro ekstarigo de la klasoj kaj al S-ro Russell, kiu helpas pri la instruado. S-ro Petley alparolis mil dungitojn ĉe la fervojo-konstruejo kaj ricevis informpetojn de interesuloj.

HOBART: Ĉe nia unua kunveno en la nova ĉambro ni varbis ok novajn kursanojn. Por la nova kurso ni luis ĉambron ĉe 452 Elizabeth Street, ĉiun mardon vespere. S-ino G. Cooper gvidas komencantojn; S-ro G. Cooper, progresintojn.

Niaj dimanĉaj kunvenoj bone iras. Inter aliaj distraĵoj ni legas kaj diskutas teatraĵojn. Marto 4: F-ino G. Lorimer parolis pri la kongreso, kiun ŝi multe ĝuis, kaj montris al ni fotojn. Marto 9: Ge-sroj Cooper invitis nin ĉiujn viziti ilian hejmon, por aŭskulti diskojn kun E-parolado, kantojn kaj lecionojn. Tre ĝuinda! Ni dankas al Ge-sroj Cooper.—Aldo.

CANBERRA: Nia porkomencula klaso akceptiĝis de la Kanbera E-Klubo. La kurso Szilagyí progresas. Tri membroj studas en ekzamena klaso per Nelson's E-Kurso ĉiun mardon ankaŭ. La K.E.K. studrondo kunvenas la duan merkredon en ĉiu monato. Vizitis Kanberon Roderick Fletcher kaj Ian Braid el Melbourne. Ili estis membroj de la klubo ĉe Scotch College kaj nun studas ĉe Ormond College. Du klubetoj fondiĝis en la Registara Gimnazio kun 36 anoj sub gvido de s-ino C. Ramage kaj F-ino Free.—Jean Harvey.

ĈU RIDINDE?

Doktoro, bonvolu sincere diri al mi pri kio mi malsanas; sed per simplaj, ordinaraĵoj vortoj—ne en la latina aŭ greka.

Vi ne havas malsanon, sed vi estas kruda drinkulo kaj tromanĝemulo.

Hm, do bonvole diru tion al mi en la latina aŭ la greka, por ke mi povu priinformi la edzinon.

Kiel statas al vi la edzeca vivo?

Dum la unua semajno mi parolis kaj ŝi aŭskultis. Dum la sekvaj du semajnoj ŝi parolis kaj mi aŭskultis. Nun, ni ambaŭ parolas kaj la najbaroj aŭskultas.

Kiam la reĝino de Havajo vizitis Anglujon, ŝi havis aŭdiencan kun la Angla reĝino Viktoria. Konversaciante, ŝi diris, ke ŝi havas Anglan sangon en la vejnoj. "Ĉu vere? Kiel?" demandis la Angla reĝino. "Antaŭuloj miaj manĝis Kapitanon Cook" (kuk).

Membro: Estas senutile plu diskuti la aferon. Duono de la membroj estas idiotoj.

Prezidanto: Mi postulas retiron de tiuj vortoj.

Membro: Do bone. Duono de la membroj ne estas idiotoj.

Kuracisto (antaŭ operacio): "Nau el dek pacientoj kutime ne trapasas vive tiun ĉi operacion. Ĉu mi povas ankoraŭ ion fari por vi, antaŭ ol komenci?"—"Jes, estu tiel afabla kaj helpu al mi surmeti mian mantelon!"

NUR DISTRE . . .

L. Laurat en Sennacieca Revuo (80) nomas "pleonasmaj ŝtatoj la landojn satelitajn au orbitajn al la Sovetunio, ĉar ili sin nomas "popol-demokratioj". La Greka "demos" signifas "popolo", sekve "popol-demokratio" devus esti tradukita, ĉu per "demo-demokratio", ĉu per popolpopolregimo".

★ ★ ★

S-ino Fraser (Brisbano) skribis: "Se oni demandas al mi, Kiom da amikoj alestis la E-kunvenon ĉi-vespere? kaj mi respondas: Eble kvar-kvin—oni nur rezigne mienas. Sed ŝi mi respondas—Nau-dek—oni mire levas la palpebrojn nekrede.

Jen eho de ŝia observo: En sia traduko de Otelo, Rossetti ŝanĝis la

tekston, uzante "du-tri fojojn" anstataŭ "nau-dek fojojn", kiu lasta estus dusence audata. Auskultanto povus erare kompreni: naudek (90). Li povus uzi: nau au dek; nau, eĉ dek; nau, eble dek.

★ ★ ★

Rhodes kaj Waringhien donas "Adelaido", "Sidnejo"; Jung donas "Sidnejo". Fulcher-Long—"Adelaido", "Sidnejo".

The A.E., p. 153; Legu, C.J.C. NE C.C.C. Simila eraro sur p. 140.

★ ★ ★

Ĉu vere?—"La sveda, dana kaj norvega lingvoj diferencas inter si preskaŭ ne pli ol dialektoj en Britujo" ("Loom of Language": Bodmer. Paĝo 276). "Danoj kaj Svedoj povas senpere legi la Norvegan" ("Belarto", n-ro 2, p. 62).

Unu el la plej facilaj manieroj diri malveron estas, diri nenion krom veraĵoj—sed ellasi ion necesegan.—E. H. Dance.

D.B.G. (British E-ist, p. 147, Okt., 1961) rekomendas "dekumulo" por "teenager". Preferinda tamen estas "dekkelkjarulo". Aliaj formoj konsiderindaj: adoleskulo, adoltingulo.

"Ĉinoj trovas E-on malfacila, sed ne tiel malfacila kiel la Angla. Ĉu ni bezonas la tri radikojn poem-, poezi-, kaj poet? Por Ĉino du estas nenecesaj: Li dirus poeziero, poezio kaj poeziisto". (Same, p. 140.)

Traduku: "Saul sent messengers again the third time"—1 Sam. 19/21. Komparu ĝin kun "Saul plue sendis triajn senditojn . . ."

La dua spacvojaĝinto, Germano Titov, estas filo de malnova E-isto, emerita profesoro, kiu ankoraŭ aktivas, E-igante klasikajn verkojn el la mondliteraturo. Al la fidela Stefano Titov telegrame salutis la Univ. E. Kongreso. (Lau informo de "Hungara Fervojista Mondo.")

Vilao estas somerdomo, kampodomom. Ne traduku per tiu vorto la tielnomatan "villa", pri kiu tamtamas la bienvendistoj.

Esp. grupo de elektra maŝin- kaj kablofabriko dez. kor. Gyomroi ut. 128, Budapeŝto.

Recenzoj

AMUZO PER SCIENCO is the second book in Esperanto published by Associated Newspapers Ltd. ("Daily Mail", &c.), Carmelite House, London, E.C.4. Written by Charles Vivian, it is translated by D. R. Duncan, Ph.D., B.Sc., and covers 98 pages with what must surely be the most interesting material on the subject ever compiled. It is designed for young people's experiments in physics with the simplest elements and gives 96 such, richly illustrated with photos and diagrams. Here are a few examples: How to find the centre of gravity; air compression; the "skin" on water; how to make a periscope, compass, telephone, siphon, thermometer and—a hole in the hand; reflection of sound; sympathetic vibration; inertia; magnetism; inverse writing by mirror; pulse reading; all of which are feasible for a child with readily acquired objects.

Most grown-ups are but children when it comes to physics, and would gain hours of happy employ practising with their family the simple tests set forth here.

The moderate cost (10/- Aust.) is in keeping with that of the excellent "Libro pri Bestoj" and debars no-one from seeing that the book is in the home by Christmas—if not before.

We sincerely recommend it as a soundly worthwhile purchase. Order through agents, Mrs. Milligan, 274 Mont Albert Road, Surrey Hills, Victoria, or above address.

Belarto: Jara suplemento de "Esperanto" (U.E.A.), 68 p. 36 enhavaĵeroj. 13 steloj.

Pli kultura ol amuze distra, la n-ro 2 enprenas kontribuojn ankaŭ el Japana kaj Hinda fontoj, verstradukoj de Skota balado kaj parton de Estona epopeo krom prozajn el malgrandaj lingvoj kiel la Rumana, Bulgara, Finna. La plej longa prozverko, skizo de Anglo Eric Knight pri fantazia aberacio koncerne la tempopasadon, eble impresas multajn kiel tro-longa vortŝpinado sen sufiĉa temforto. Ĝialoke ni preferus ian novelon, pri kiu oni vaste rigardas ĝin kiel indan je presapero pro efektiva merito. Ekzemple, unu elektita el antologio de mondaj "perloj" tiuspecaj.

Ekster kelkaj pli-malpli popularstilaj prozaĵoj kaj versprovoj, la cetero estas direktita al mensĵoj familiaraj kun la etoso de studkabinetoj. Jen aprobinda, sed dube adoptinda celo, ĉar ĝi baras kontraŭ vasta ŝata-teco ĉe la milmiloj da simplaj, lingve modestaj E-istoj serĉantaj konforman legmaterialon.

Preso de iuj paĝoj per verda inko, kaj surpriso sur nigran per verdliniaj karikaturodesegnoj ne faciligas legadon.

Sur p. 39 la aŭtoro nomo mankas, sed troviĝas en la enhavlisto. Aliloke ne estas indikoj pri la nacilingva deveno (11, 21, 54, 60), la konata nacieco de tradukinto ne ĉiam certigas pri la lingvo el kiu li tradukis. Strangaj formoj: aprioraj prononcoj (asertoj). "Prononco" ne taŭgas por traduki la Anglan "pronouncement", kiu estis en la menso de la aŭtoro. "nacilingve korokodilas" (?); "tomboktua" (Timbuktua); "eks-blankaj paĝoj"; "ĝis favoroj", "ĝis bagateligi".

Malgraŭ la supra kritiko, ĉiu konsci(en)ca E-isto mendu la revuon, per tio subtenante indan entreprenon kaj sin levante ĝis pli alta nivelo intelekta.

"Hungara Vivo", ampleksa, riĉenhava revuo kvaronjara. Kunlaboras Baghy, Kalocsay, Bodo, Tarkony. 13/9 Aust. Keesing, P.O. 4886, Sydney.

Moderna Martiro: trad. el la Nederlanda. Inst. S. Kamilo, Bierbeek, Belgium. 64 p. 4 r.p.

Polo, Patro Kolbe, en 1941 oferis sian vivon kiel anstataŭinto de kondamnita familiestro. Kortuŝa historio de dediĉita viro, kaj animŝira rememoro pri la teroro en Auschwitz. "sekvema karaktero" (obee gvidigema?); konventualo (konventano).

De la sama eldonejo ni ĵus ricevis: **La Mirindaĵoj de Maria**, devotadoro al la Sankta Patrino. 30 p. **En la Servo de la Legio:** Edel Quinn, Irlanda misiistino en Afriko. 38 p.

Nia Korpo: Prof-o Seiho Nishi (Tokio). Eldono de Gunma Esperanto-Societo, 1961. Havebla ĉe Japana Esperanto Instituto, Hongo-Motomati I, Tokio. Prezo 1.20 Us. dol.

La subtitolo de la libro estas: "Anatomio kaj Fiziologio de la Homo, por Laikoj" kaj vere la aŭtoro sukcesis prezenti, en konciza sed tre suka maniero, klarajn ideojn pri tiuj kon-fakoj. Tamen oni povas trovi, ke kelkaj detaloj, precipe ĉe la priskribo de la muskol-aparato, estas iomete tro altaj por asimilado fare de laikoj. Entute la multtego da nocioj enkondukitaj en la libro estas tute komprenebla por atenta leganto, kaj oni devas aserti, ke post diligenta studado de la tuto, studanto sendube sin trovos posedanta scion pri kiu li ne havis eĉ ereton da supozo.

La ĉapitroj pri la digestado, la generado, la sistemo de la interna sekrecio (endokrini glandoj), la metabolo, estas ellaboritaj kun admirinda klaro kaj per metodo simpla. Ili interesas eĉ kuracistojn jam longe familiarajn kun la informoj. Tiu pri la nerva sistemo estas mirinde simpligita lau elementa skemo, sed laikoj devas diligente uzi la cerbon, por ĝin plen-kompreni. Malmultaj prezeraroj; bonaj papero kaj preso.—C.J.C.

The **Economics of Silvio Gesell**, founder of a system of monetary reform. 12-page booklet in five languages (inc. Esperanto), equally condemns capitalism and communism, and sketches its theory of a free monetary society. Those familiar with the problems, as dealt with by similarly motivated bodies—Geonism, Single Tax, Douglas Credit and such—may further their studies by contacting Libersocia Rondo, p.a. Bernd Hasecke, Velbert - Rheinl., Koenigstrasse 26.

La Idolo Plej Longe Vivanta: Eldonita de la Spiritiscienca Instituto de Martinus, Mariendalsvej 94-96 Copenhagen. 96 paĝoj. Prezo ne indikita.

Tri jarojn post apero de la N-ro 6, jen ni havas la sepan libron de tre interesa serio, bone tradukitan de C. Graversen.

La ĉefa temo estas komparo inter la "pura Jesua doktrino kaj etiko" kaj karikaturo bildo de Dio en la Malnova Testamento — librokolekto kompilita eble dum jarmilo. La verko estas kelkrilate saniga kritiko pri multo ankoraŭ diskutinda en la

ortodoksa Kristanismo, sed la aŭtoro ignoras aŭ nescias la vastan laboron de modernaj teologoj, kiuj, laŭ la teorio de progresiva revelacio, penas prezenti racian rilaton inter la du Testamentoj.

Li ankaŭ ne citis admirindajn tekstojn el la Malnova Testamento per kiuj profetoj kaj aliaj montris al tre edifaj konceptoj pri sia Dio.

Krome, kritikante la doktrinon de la perkruca "repaciĝo" inter Dio kaj la homaro, Martinus evitas mencii signifajn dirojn de Jesuo mem pri lia mistera misio (Mateo 20/28; Marko 10/45). Tamen, malgrau inklino al trodrastaj interpretoj, la libro meritas atenton de tiuj, kiuj volas pacience kribri orpecetojn el la stonaĵo.

Manntalid 1703 (Population census 1703) comes from Dr. T. Thorsteinson in Reykavik. Published by the Statistical Bureau of Iceland, it may be compared with the 11th century Domsday Book in England as an inventory of persons and property throughout the entire country. Its detailed account in Icelandic is given resumes in English and Esperanto, and, thanks to the latter initiative, the book will awaken interest among demographers in every land to which it is sent. We congratulate our Icelandic friends on their initiative in using the international language for this laudable end.

The example of Icelandic shows that a language may stray far from home and still retain written characteristics lost by those which stayed behind. The grammar of its sister tongues—Swedish, Danish and Norwegian—have now become simpler than even German. It differs little from the Old Norse of the sagas, which Icelanders read as the English read Shakespeare. Their letters (eth and thorn) used for the two sounds of "th" are the same as in our Anglo-Saxon (Old English).

S-INO V. FRASER.

Septembro 1 ni ricevis leteron (21/8) pri ŝia vastetenda vojaĝo en Anglujo, ankaŭ la unuan intormon pri la Kongreso ĉe Harrogate, pri kiu—sub tutpaĝa krilino—The Harrogate Herald plene raportis. Eble 1700 alestis ĝin.

En la Lagoregiono ŝi luncĉe altabligis kun kvar E-istoj—du germanoj kaj francino. Tiu prenis el portpoŝo vortareton franc-anglan, por povi mendi manĝon. S-ino F. diris: "Vi ne bezonas tiun; mi parolas angle". Je tio la francino remetis la vortaron. Kelnerino venis por preni mendon kaj, per plej dialekta idiomo de Westmorland elvoĉis ion nekompreneblan por s-ino Fraser, kiu petis rediron de la vortoj. La kelnerino ripetis la frazon. Denove nekompreneblo. Jen ankoraŭa ripeto: sed vane. Aŭdinte tion, ĝentile sarkasmis germano en E-o, "Ŝajne ankaŭ vi ne komprenas la anglan". Ili kune ridis.

S-ino F. esperas ekiri Aŭstralion je la 8 Nov.

Infanoj Ne Konas Limojn.—111 fotoj; 32 paĝoj de tekstoj de Sam Waagenaar, G. Simenon, H. Boell, Ito Saburo, I. Lapenna, kaj 7-paĝa klarigaro pri la fotoj. Regalo por fotart- kaj infanamantoj! Bedaŭrinde, pro la limlinio inter la du socipolitikaj blokoj ĝi ne enhavas bildojn el trans la "kurteno" . . . ŝajnas, ke ankaŭ la kompatindaj infanoj ankoraŭ restas inter limoj. Krianta neceso de nia nuna epoko estas: Ankaŭ super la monda potencpolitiko konstati la esencan identecon de la homa naturo kaj ĝiaj komunaj aspiroj. Havebla ĉe U.E.A.

Reeĥoj. Jugoslavia poemaro. Eld. Stafeto, La Laguna, Tenerife, Canary Islands. 112p. Unu Usona dol.

En la 640 "Esperanta Antologio" aperis nur unu Jugoslava poemo. Tiu fakto instigis al tiulandanoj kompili kaj eldonigi pere de la sama eldonejo kolekton de 56 poemoj de 19 homoj. Rezultis el ilia entreprenemo iom tre taŭga prezento de tiu Slavopola talento. La elektitoj principe aŭ nekonscie ignoras la "kosmon", kaj sin dediĉas al teraj emocioj kaj sentoj. Plaĉas la sentitola de F. Homar (26), kiu vekas vaste respondajn kordojn; Amiko (62) kaj Ho, Belas Viv' (75). Kion signifas: la luna lum' arpeĝis? En la trista Al Aborta Ido, "La kun' de vi . . . kaj ni . . . eglas: La kun(ul)-

eco . . . Aŭdaca kompakto, tamen klara. Funde instrua kaj sentotuŝa estas la enkonduko de M. Boulton; ŝi estas modelo de semriĉaj ideoj kaj klara diresprimio. M. Givoje kontribuis eksplikan prologon.

Scienca Revuo, for the specialist. Nr. 3/4 contains inter alia Problems of Bird Migration, Weight and Breathing on Space Voyages, History and Habitats of the Jackal and a Complete List of scientific and sectional dictionaries in Esperanto. Reviews, reports, comments. It is a quarterly, priced at 30 steloj. Agent: Dr. C. J. Adcock, Box 196, Wellington, N.Z.

DATINDIKOJ KAJ ALIAJ

En Usono oni unue skribas la monaton, poste la tagon kaj poste la jaron. Se Franco datumas ion ekz. per 2/6/1961, signifante la 2-an de Junio 1961, al Usonano tiu dato signifas: Februaro la 6-an 1961.

En Usono oni kalkulas la etaĝojn komencante de la teretaĝo, kiu estas nomita "la unua etaĝo". En Francujo, kio estas ilia unua etaĝo estas por Usonano la dua etaĝo.

Pro naciaj kutimoj ni uzas: trinkmono, spicejo, kafejo, fervojo. Pli logike: dankmono, proviantaĵo, trinkkafejo, relvojo. Ni nomas "buĉisto" iun, kiu neniam buĉas bestojn, "plumbisto" iun, kiu ne uzas plumbon, kaj ni "priskribas" akcidenton, dum ni nenion skribas.

Via, kaj mia, Esperanto bezonas pli da precizeco.

—C. Chomette en "Heroldo de E-o."

PRI ZAMENHOF

Legu la sekvantan konekse kun nia artikolo sur p. 148. "En letero de 5.10.1952 s-ro Salzmann skribis al s-ro Jossinet: 'Mi ne ĉeestis la Krakovan Kongreson 1912, sed miaj amikoj, kiuj vizitis ĝin—ili estis ĉiuj gasmortigitaj en la lasta milito, tiam rakontis al mi, ke Zamenhof dum sia ĉeesto en la Krakova Sinagogo estis honorvokita al la Tora, kaj donacis monon por la sinagogo, por malriĉaj malsanuloj kaj por la hebrea maljunulejo'.—El privata letero.

Leteroj: Tri nepublikitaj leteroj de Zamenhof aperis en La Pola Bulteno, Majo 1956. Ili havas daton 1912. En unu Z. skribis, ke li naskiĝis en Lito-vojo. Li petis, ke oni nomu lin "filo de pola lando, sed ne poloj". "Lau deveno mi kalkulas min al la gento hebrea". "Mi estas hebrea".

ESEO. Ni ankoraŭ atendas aliĝojn al ĝi. Legu detalojn en la Jan.-Feb. n-ro. Ni bezonas almenaŭ ses provantojn, alie ĝi ne havos validon.

VIETNAM SPEAKS

For many Asian and African countries, whose language, literature and cultures are ignored by the world, Esperanto is absolutely necessary to cultural exchange. To Vietnam, and all such lands where translated literature hardly exists and where original work is undeveloped, Esperanto provides a rich international library of thousands of books. It is incredible but true that after 80 years of French occupation, my country has no translation of Hugo, France, Maupassant, Zola, Balzac and others. Thanks to Esperanto we may read, to mention only a few, Pharaoh, Pan Thaddeus, Quo Vadis, Romeo and Juliet, Eugene O'Neill, The Inspector. — Nguyen-Van-Kinh, Vietnam ambassador to Moscow, Bucharest, Tirana.

(He could have filled a page with the names of classical works and fine literature translated into Esperanto.—Edito:.)

Correspondence! With teachers (letters and pupils' drawings): Kazuja Ishikaua, Futasegawa, Kakegawa-shi, Shizuoka-ken, Japan.

Teacher (26): ilus. p. cards. Vladimír Michl, Namesti kg. 183, Vrchlabi, Czechoslovakia. Letters and objects: G. Kostov, str. Vasil Zarkov 19, Vraca, Bulgaria. P. A. Todarov, Sredna Gora 88, Sophia, Bulgaria.

Australian firms using Esp-o, contact Adresaro, CEKIT, Piazza Oberdan, I-Milano, Italy.

Could anyone review a book on ophthalmology? To such we would give the impressive work of Japanese professor Seiichi Kato, Shinshu University.

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.

Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 28 (108)

MELBURNO

Majo - Junio, 1962

FROM IDEAL TO ACTUALITY: FROM PROJECT TO LIVING TONGUE

Worldwide Co-operation Forged Unique Speech-medium.

Dr. Juan Regulo Perez (Univ. of La Laguna, Tenerife) speaking before the Lingua Club, Manresa, Spain, said:

"Each age of history has had its parasites, who derive pleasure from placing obstacles to progress. Among such of these who turn international antagonisms to their use, there abound, especially in our time, those who would retain the chaos of Babel, and, to that end, persist in repeating fallacious arguments that Esperanto is inadequate as a cultural instrument.

When it was launched, Esperanto was, in truth, only a project. But in 70 years what was a project has become a living entity with a unique tradition—the first and only such to pass, as a unifying element, the frontiers of every land.

An impressive testimony to this cultural tradition was the appearance in 1958 of *The Anthology of Esperantist Poems: 1887-1957*, a 648-page volume of 360 original Esperanto poems by 90 writers in 35 countries, from Iceland to New Zealand. Students of Esperanto literature have in this book sound factual material wherewith they may trace the workings of those spiritual elements that changed a mere project into a living language. And non-Esperantist linguists and literati may, at little cerebral cost, and by honest perusal of

the volume, bring themselves to realise that Esperanto represents a true international culture, as we claim it to be.

To this example from literature we may add from the field of science one not less convincing. Early in 1958 was published "*Sciencaj Studoj*", a series of 36 original monographs by Esperantist scientists based on their researches. It was issued by the Esperantist Scientific Association, one of whose presidents was Nobel Professor J. J. Thomson. The authors were drawn from 19 countries with 16 distinct languages, and one could hardly find a more telling witness to the reality of the universal character of a culture active on all aspects of Man and Nature.

Last but not least, in 1957 appeared the first complete collection of a great poet, translated into Esperanto — "*Les Fleurs du Mal*" (Baudelaire) in 400 pages. For ten years a band of Esperantist scholars worked over it, under the direction of French litterateur Prof. G. Waringhien, who controlled its textual fidelity, and of an Hungarian linguist, Dr. K. Kalocsay, who attended to its form and expression. Perhaps the most significant judgment on the translation is that of the prestigious literary review "*Papeles de Son Armadans*" (directed by the Spanish Academy with Camilo Jose Cela).

This review had hitherto regarded as impossible a poetical reproduction in foreign languages of Baudelaire's work, judging by the failures evident in Spanish and other tongues. Now, after a critical analysis of the Esperanto rendering, its earlier conclusion was withdrawn, and with honesty and admiration the review proclaimed that indeed Esperanto had realised the miracle, from the standpoint equally of form, content and literary ethos.

One could cite other examples of Esperanto activity — from library-economy to medicine, from linguistics to law, from art, politics, oratory to geography, botany, history, ethnology and plant-pathology, in monographs carefully compiled and written in original Esperanto for men everywhere.

Esperanto has been transformed from a project into a potent social factor through the genius of Zamenhof, who from the first regarded it as a social factor, and consistently equipped it to become such. He thus initiated an incontestably unique language. And this uniqueness comes from the fact that it is neutral, easy and free; men of all nations, of all classes, may master it and use it with no sense of humiliation. When certain tongues call themselves "international" and point in proof to their literature, they sophistically sidestep the fact that such literature is NATIONAL, not international, since all work in it is without exception written for their own nationals, and is devoid of any true international, universal spirit.

On the other hand, the Esperantists present the sole phenomenon of a literature with planetary extension, created by gifted writers from whatever corner of the earth their talent is found.

They form, then, a unique "country", the only country where "equality and fraternity" has ceased to be a pious Utopian slogan, and has become realised in a realm free from the divisions of language, race and religion.

It is good to live on after death in a noble work bequeathed to one's fellows; so, on the occasion of the first centenary of Zamenhof's birth, we honor his memory and his

posthumous blessing, hailing him as the Initiator of Esperanto, the potential unifier of humanity in a common culture.—(Trans. Farbo).

To show that the orator's sentiments are widely shared we can quote but one witness—a voice from Rio de Janeiro, that of I. Gomez Braga:

"For the first time in history we are present at the impressive spectacle of seeing united in one language lofty talents of all regions of the earth, preparing, as it is, one immense culture which embraces all the others. This worldwide collaboration is producing things marvellous in our eyes.

"For the first time in the world a universal cultural language is being created by the joint labors of all. The language grows and is being enriched with all that humanity has thought and is thinking."

(The above two citations are taken from "Boletín Uruguayo de Esperanto", Montevideo.)

ESPERANTO DISC.

Editions Francaises D'Esperanto, Marmande, France, has issued an unbreakable disc, microgroove 45 turns, on the pronunciation of Esperanto. Dario Rodriguez, Madrid, vocalises a series of words containing all the letters of the Esp. alphabet, and letter-groups, which is followed by sentences about the language and the life of Zamenhof.

On the other side Emilia Lapenna, Zagreb, reads texts on the Esp. Culture Centre, Gresillon Castle, and the 1957 Esp. World Congress at Marseilles. Light blue label. The first edition three years ago was green. Price 12 steloj (8/-) post paid. We recommend this disc as a worthy investment.

PRI GOERING

Kuras rakonto: Goering iam diris, "Kiam mi aŭdas la vorton 'kulturo', mi ekprenas mian revolveron". Iuj diras, ke tio ne estas laŭvorte ĝusta—Li diris: ". . . mi ekprenas mian Browning". Sciu, ke Browning estas la nomo de fama Angla poeto—ankaŭ de Usona armilfabriko, kiu produktas la konatan revolveron. Ĉu iu povus citi la aŭtentan diraĵon?

Australia Kroniko

★ **PERTH:** Jen la nuna Estraro: Prez.: S-ro C. Dean; Sekr.: S-ino G. Pollard; Kasistino: S-ino E. Palmer; Biblioteko: S-ino R. McGrath; Libro Servo: S-ino A. Sedgley (123 Gregory St., Wembley, WA) okazas nun 3 klasoj: Lundvespere en la klubejo (62 Havelock St.) okazas kurso por komencantoj. Ciumarde okazas dumtaga klaso en la Kiosko sur la "Esplanade". Bonvena vizitanto tie estis S-ino M. S. Kruger el Sud-Afriko, same kiel malnova membro F-ino Angvin. Studgrupo kunvenas ĉiun mardvesperon en la klubejo.

La 8-an de Majo S-ro Illingworth montris interesajn lumbildojn pri vojaĝado en Azio. Li vizitis Singaporon kaj veturis laŭlonge de la okcidenta marbordo ĝis Penang kaj la orienta marbordo ĝis Kota baru. Belajn bildojn ni ankaŭ vidis pri Honkong, Okinawa kaj Japanujo. Sprita kaj vigla estis diskut- (aŭ disput-) vespero, kiu okazis 17-an Majo inter edzoj kaj edzinoj pri la mastrumado kaj estreco en la domo.

Nia mondmigranto Jack Hawks forlasis per ŝipo "President Cleveland" San Franciskon la 5-an de Majo kaj atingis Japanujon je 20/5. Post 2 semajnoj en la "Lando de la leviganta suno" li vojaĝas al Honkong, Singaporo kaj Rangoon. Li intencos iri al Sud-Afriko, kaj per ŝipo "Southern Cross" alveni en Fremantle venontan Oktobron.—H.K.

★ **MELBOURNE:** Pri la Sidneja kongreso aperis interesa artikolo en la virina revuo "Woman's Day". Multaj personoj legis ĝin kaj tiom multaj aliĝis ke ni devis organizi por ili 2 kursojn, kiuj nun okazas paralele ĉiun lundon en la Esperanto-Domo. Feliĉe por ni, ni ĉijare havas 2 bonajn profesiajn instruistojn. S-ro Donald Broadribb venis ĉe ni kiel enmigrinto de Chicago, U.S.A., kaj S-ro Marcel Leereveld translokiĝis al Melburno de Hobarto. Samvespere, S-ro Frank Taylor gvidas kurson por progresintoj kaj S-ino Fay Koppel estras Stud-Grupon. Nia Esperanto-Domo estas plene okupata lundvespere kaj en ĉiu ĉambro okazas kursoj kaj kunvenoj.

El la preleĝprogramo elstaris: 12/2 S-ro Broadribb pri la historio de Ido,

Interlingua, Ro kaj Esperanto. Lumbildparoladoj de S-ro Taylor pri Hispanujo (26/2) kaj Universalaj Kongresoj en Kopenhago kaj Bruselo (30/4); de S-ro Ryding pri vojaĝo al Kvinlando (5/2) tra Eŭropo (26/3) kaj "Hispanujo" (28/5). S-ro F. R. Banham (19/3) prelegis mallongajn rakontojn. Prelegis S-ro Donald Broadribb: Komparo inter la vivo en Usono kaj Aŭstralio (2/4) kaj pri la Esperanto-literaturo (7/5). Samvespere ni bonvenigis S-inon Mina Bedwell el la Manly E-Klubo.

Ĉe la Ĝenerala Kunveno (5/3) oni elektis novan estraron: Prez.: S-ro E. McKenzie; Vic.-Prez.: S-ro W. J. Drummond kaj J. Ryding; Sekretario: S-ro H. Koppel; Kasisto: S-ro M. Cohen; Biblioteko: S-ro F. Taylor; Kurskonsilanto: S-ro M. Leereveld.

La klubo aranĝis specialan salutvesperon je 15/3 por bonvenigi la eks-raĵaon de Sarawak—S-ro Anthony Brooke, konata pacifisto kaj Esperantisto.

En la januara kunveno de la RENDEUVUO S-ro F. Taylor montris lumbildojn pri Anglujo. Ges-roj Hanks en Februaro treege interese parolis pri "Naturo, Demandoj pri Kiuj ne estas Respondoj. En Marto Jim Dimo venis el Ballarat kaj parolis pri la historio de la muziko. Post li kaj la Aŭstralia akordeonĉampionino Jennifer Clack prezentis belegan muzikan programon. En Aprilo S-ro F. Taylor montris denove lumbildojn pri vojaĝo en Eŭropo, kaj en Majo S-ino I. Fink prezentis memfaritan filmon pri la Sidneja Kongreso.

★ **SYDNEY:** (1 Marto - 11 Junio) Okazis kunvenoj ĉiun lundon krom Pasko, kaj ankaŭ diversaj aliaj programoj. Plej grava entreprenado estis Esperanta Ekspozicio (12-13/5), sed okazis pluvego multkola dum la semajnfino kaj malmultaj ĉeestis por rigardadi la sufiĉe allogajn montratajn. Kelkfoje entreprenis programojn nia sekretariino, Rita van Ryswyk, kiu dufoje estris programon "Forumo" (16/3, 14/5), kaj unufoje "Cerbogimnastiko" (8/4). En "forumo" duope elektitaj viktimoj klercede diskutas temojn proponitajn de la estrino, kaj poste kiu volas ankaŭ parolas. En "cerbogimnastiko" la

ĉeestantaro estis dividita laŭ du teamoj por respondi demandojn pri ĝeneralajoj kaj pri la Esperanto movado. Se la fraŭlino celis paroligi, S-ro Gueltling kelis instrui. Li dufoje estris programon "Konversacia kurso" por montri modelon de la Cseh metodo, kaj ankaŭ dufoje "Ĉu vi scias uzi vian vortaron?" por eksplicite principojn kaj respondi la demandojn de la anoj. Okazis tri amuzvesperoj (3/3, 5/5, 9/6), la unua speciale por festi la unuan datrevenon de la Manly klubo kaj donaci al ĝi flagon Esperantan.

Prelegantoj de la periodo estis:— S-ro Dunn, kiu parolis (19/3) pri "Aŭstraliaj sintenoj al rasoj"; S-ro Matasin, kiu montris lumbildojn kaj parolis (29/4) pri sia ferivojaĝo aŭstralia; S-ro Chandler, kiu parolis kaj pepis (21/5) pri "Birdoj en kaj ĉirkaŭ Sydney", eble la plej ĝuinda programo de la periodo; S-ro Davidson, kiu montris lumbildojn kaj parolis (28/5) pri sia revizito al Skotlando; kaj F-ino Hampton el Novzelando, kiu montris lumbildojn kaj parolis angle pri sia lando. Aliaj programoj kun kelke da parolado estis la sonbendoj, plejparte pri Esperantaj oratoroj, aŭdigitaj de S-ro Matasin (12/3), kaj la gramofondiskoj, pri kantistoj novaj kaj malnovaj, aŭdigitaj de S-ro Mueller-Sorau (15/4).

Dume, S-ro Wouters finis unu kurson por komencantoj kaj komecis novan, kaj S-ro Mueller-Sorau instruis kursojn en diversaj vesperaj lernejoj.—F. M. DUNN.

"WINNIE - THE - POOH"

Thinking of all the poor little children in old Rome who could not read Milne's cloyingly cute composition, Dr. Lenard has done it in Latin—the very thing dozens of moderns, maybe 50, have been waiting for. It was published in prosperous America, where there is a crib in every nursery. Here and there his stylus slips: panistostatus cum butyro makes little sense in its Roman context. The ancients had no toast (rostita pano) and no word for it; though they had a word for butter, they never used the stuff. Thus "Time", 26/12/60.

A revised reissue of "Alice in Wonderland" in E. L. Kearney's Esperanto translation would be more practicable, for such would meet a need of thousands of young folk now studying the international language. Are none of our long out-of-print works worthy of a lease of new and more expanded life in this our day?

PRI LA IRONIO

Vidu: La Rondo, Julio, 1947.

"Ĉiam la homo bezonas kaj volos esprimi, ne nur siajn ideojn, sed, kaj antaŭ ĉio, siajn sentojn; kaj, same kiel okazis ĝis nun, la esprimado de la ideoj mem estos preskaŭ ĉiam miksitaj kun tiuj de la sentoj—estos sente kolorigita. Kaj la sento estas la ĉefa fonto de ĉiuj lingvaj mallogikaj kaj, neraciaj . . . Vi mem, kara Lanti, kiu kredas vin tiel raciema, kial do vi tiel ŝatas la ironion kaj provas ironie prezenti viajn tezojn? La ironio, kiu instigas vin ŝajnesprimi la malon de via penso kaj iel inversgas ties signifon—la ironio estas interveno de la sentoforto en la paroladon: pure racie konstruitaj estuloj ne nur ne uzus, sed eĉ ne komprenus la ironion!"—Waringhien, en Sennacieca Revuo, Junio, 1939.

LA DIRO DE CART

"Kio en nia lingvo estas klara, tio estas bona, eĉ se ĝi ne estas gramatike korekta; kaj ĉio, kio estas gramatike korekta kaj tamen ne klara, tio estas malbona."

Waringhien (Sennacieca Revuo, Junio 1939) komentis: Kontraŭe al Cart, mi aŭdacas kredi, ke oni povas kunigi la stilan klarecon kaj la gramatikan korektecon, kaj ke oni devas oferi unu al la alia nenion el tiuj du ĉefaj principoj!"

LANTI: ZAMENHOF

"Neniu scipovas Esperanton. Zamenhof mem ne ĉiam kapablis uzi sian lingvon laŭ ĝia racia spirito. Tre ofte li estis influata de l'naciaj lingvoj. Sed li estis neniel diktatorema kaj autoritata. Li donis konsilojn kaj ne ordonojn. Lia celkonfirmemo estis granda, sed li konsciis pri sia erarpovo."

Lanti daŭrigis per: "Ne pro tio, ke Zamenhof diradis, ekzemple, enkonduki Esperanton en la lernejoj

... la esperantistoj devas eterne uzi tiel balaste la akuzativon". Lanti poste menciis "ordi" uzatan kun transitiva senco, kaj komentis, ke ofte la kunteksto ebligas diveni, ĉu verbo estas uzata transitive aŭ ne. "Tamen, ĉe la lego aŭ aŭdo de "ordi", la unua ideo, kiu prezentigas estas: **esti en ordo** kaj ne: fari ordon. Por ĉi tiu lasta ideo la almeto de **ig** ne estas superflua; same **ig**, se temas pri afero, kiu fariĝas orda per si mem".

(Ekzemploj el Fabeloj de Andersen, vol. 3. p. 46: La . . . kastelo estis ordita. P. 80: Neniu ordis la -- on. P. 144: Li devis ordi, helpi . . . Red.)—Sennacieca Revuo, Majo, 1939.

ANONIMA

Ne ĉagreniĝu ĉar al vi
Amiko falsa via
Ofendon ja preparis li
El kor' kruela sia.

La amikecon — oron de kor' —
En li vi ja ne trovis;
Nu, se al vi jam mankis or',
Ĉu vi ĝin perdi povis?

Se vi skorpion pikan for
El via mano jetus,
Ĉu vi, kun sopiranta plor',
Revenon ĝian petus?

REFORM OF CHINESE SCRIPT

The Chinese Govt. has chosen the president of the Chinese Esperanto League, Mr. Huyuch, and its gen. sec., Mr. Ye Laisri, to serve on the committee for the reform of Chinese writing. The reform will be deeply influenced by the phonetic orthography of Esperanto. On the committee, as a Japanese observer, is also another active Esperantist, Professor Toki Zpnmaro. — "Nuntempa Bulgario," Sofia.

KIEL TRADUKI?

Oni bezonas vortareton da esprimoj nuntempaj, kiujn oni vane serĉas en la "kriteriaj" vortlibroj. Centoj da tiaj estas uzataj ie ĉiutage. Ekz., drive-in theatre, window shopping, "marching" girls, jukebox.

Ne serĉu ilin en Millidge, Fulcher/Long, Rhodes k.a., ĉar ilin la kompilintoj ne konis. Estonta farinto de tia poŝlibreto, kaj lia eldoninto, kontentige al si rikoltus.

Recenzoj

ĈINA ANTOLOGIO 1949-1959

Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Poŝtkesto 77, Pekin. 412 p. 13 plenpaĝaj bildoj. Prezo 2 dol.

Ĉi tiu impona kompilaĵo estas la unua el projektataj dua, tria kaj sekvontaj volumoj — vere grandcela entrepreno. Se tio fine jam plenumiĝos, ni vidos la plej ampleksan el ĉiuj Esp-aj antologioj. Verdire, estas komprenebla la situacio, kiu povas doni realecon al tia fortostreĉo: la Ligo de Ĉinaj Verkistoj jam en Sept. 1959 sumiĝis je 3136 anoj, kaj daŭre kreskas en 670-miliona lando, kie la artkreado ĉiaspeca havas liberan vojon inter la vasta publiko. Centmiloj da romanoj, noveloj, operoj, teatraĵoj, poemoj eltoentas el la popolaj tavoloj, spirante ilian idealojn kaj aspirojn.

La unua volumo enhavas 17 novelojn, 3 skizojn kaj 21 poemojn. La poemojn tradukis S. J. Zee; sep homoj tradukis la prozaĵojn: du po 1; tri po 2; unu po 4; unu po 4; unu po 7. Estas strange, ke la nomoj de la ĉefaj tradukintoj, Consinio kaj Pandiŝo (plumnomoj?) ĝis nun ne menciĝis en niaj priliteraturaj libroj kaj artikoloj. Ĉu ĉinregiona Esp-ujo estas por Eŭropaj E-centroj nekonata terparto?

La formo verkesprima estas tralibere simila en si — simple rakonteca, priskriba, en kiun tamen estas tekstita jen-jen la frazartismo de pribelece sentema popolo. La unuformeco stila ŝajnas esti rezulto de unu kontrola plumo, tamen tio ne estas menciita en la antaŭparolo. Ne troviĝas verkoj teme abstraktaj aŭ subtilaj psikaj, kio plaĉos al la plimulto da legantoj.

"Sur la Sipo: Internacia Amikeco" estas admirinde rakontita skizo, kiu impese indikas la grandan verk-talenton de juna aŭtoro. Tiu rimarko validas ankaŭ por aliaj en la kolekto.

Biografiaj notoj pri la aŭtoroj, kaj klarigoj pri terminoj entekstaj, ankoraŭ pli valorigas verkon, kies gramatika pureco kaj ĝenerale tujkomprenebla lingvaĵo alte honoras homojn de ne-Eŭropa kulturo kaj parol-komuneco.

Ĝi estas okulstreĉiga atesto pri la pensmondo kaj animbela de niaj

ĉinaj fratoj, kaj pri la elstara loko, kiun ili povus atingi en la E-a movado se ni vivus en sana homsocio kun senĉava politiko tutmonda.

"Nova Civito," dumonata Esp. revuo, 16 p. 2 dol. jare. Via della Scrofa 14, Rome.

Sendependa romkatolika, per-Esperanta gazeto. Riĉe ilustrata, bele prezentata kaj variaspekta, ĝi elspiras tolereman katolikismon kaj Di-motivatan humanismon, cele al la homara unueco.

Ĝia logpovo ŝajne efikas pli forte al homoj de meditema karaktero kaj precipe al tiaj, kiuj ankaŭ anime akordas kun la Kristana tradicio. Tamen ĝia tir-kapablo meritas pli vaste efiki. "La Mistero de Noktomezo" pritemas la vivon de la katakomboj; multaj absorbos kun profito "Mi Vidis la Sanktan Landon", rimarkante cetere la religian fervoron de la aŭtoro. "Kuracilo A" kaj "Nia Planedo Maljuna" evidentigas sciencan erudicion kaj ĝisdatan intereson de la nuntempa Romkatolika penso pri la materia mondo.

Tre bona en sia speco estas taglibro de bankoficisto, kiu strebas serviĝi sian ĉiutagan deĵordevon al idealigo de sincere Kristana vivo. Valora malkaŝo de l'animo.

Laŭplaĉe modifante, se necese, konkludojn en iuj tekstoj, ĉiu kulturserĉanto ricevos el la gazeto manĝon por la menso, kaj ĉiu sentema spirito vibros pro ĝia miriga mistiko, laŭ la grado permesita de lia ekvilibriganta racio.

"Esperanto, The International Language" (special educational n-r of "Esperanto Review", 40 pages. 3231 N.W. 62nd St., Seattle 7.

The Origins of Esp-o; Questions and Answers on Esp-o; Esp-o in Schools, in Religion, at U.N.; Esp-o Magazines; "Instant" Esp-o—resume of its structure; Esp-o Postage Stamps, and, in Esperanto, Internacia Esp-o Muzeo, Vieno. Vocabulary, addresses, &c.

Some pages need bringing to date, and space given to less relevant matter might have been given to reference to uses in science and technology. We learn that "La Migranto" is a "nudist quarterly", and the editors of "Kunhomaro" (?),

"Laborista E-isto", "S.A.T.-Amikaro" and "Sennaciulo" have been glad to know that their gazettes are "largely heavily financed and unusually luxurious". To popularise Intersteno, a shorthand system, its sponsors strangely publish—"Kooperativismo"!

"Lewis Zamenhof" looks strange; Ludwig or Ludovic is preferable. Some press errors sting the eyes: S.A.T. Amerikaro, Budgario, Studa (!) Stelo, guttural, snuperfluos . . . And Falgier's well-meaning rhetorical question: "Who can master English as thoroughly as the successful student of Latin?" is one that he should know is highly debatable.

Compiled similarly to the Special Centenary "Rondo", the issue gives brief surveys to stimulate the non-Esperantist to drop the "non".

"Lernolibro de Oftalmologio" de Prof-o Seiĉi Kato, Shinshu Universitato, Matumoto, Japanujo. Eldonis Aosiĉima, Tiba. Nur per Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati I, Tokio. 88 grandformataj paĝoj, kun desegnoj, diagramoj. Prezo 1.40 Usonaj dol.

Originala verko en E-o. La aŭtoro rimarkas, ke la rilato de la okulo kun ĉiuj partoj de la korpo estas intima, sekve multaj fruaj simptomoj de ĝeneralaj malsanoj sin trovas en okulglobo. Li bedaŭras, ke Zamenhof, mem okulisto, ne originale verkis pri la oftalmologio, "krom ke li tradukis unu ĉapitron de Fuchs'a lernolibro." (Vidu en Fundamenta Krestomatio. Verdire, oni ne estas certa, ke Z. ĝin tradukis.

La libro estas dusekcia: ĝenerala kaj speciala. La unua klarconceze pritraktas la formon kaj funkcion de la vidorgano kaj ĝiajn reagojn al lumo, koloro k.a. La dua, la malsanojn, kiuj atakas la okulpartojn; kaj indikas rimedojn kuracajn.

La verko estas tre valora ne nur por fakulo, sed ankaŭ por studemaj interesatoj pri la miraklo de la homa korpokonsisto. Densa uzado de teknikaj vortoj provizas materialon por kompilo de bezonata fakvortaro.

Ekzemple, kiel oni esprimus per komuna lingvaĵo la strangajn kolorkompleksojn kaj lumformojn vidatajn de homoj, kiam; lite kaj mal-lume, ili "rigardas" ilin per fermitaj okuloj sur nigra fono? Sajne la feno-

meno rilatas al "fajreoj" au "skotomoj" (p.6). Bedaurinde ne aldoniĝis kompleta glossaro al cetero tre signifa kaj utila prezentaĵo de la scienco.

"Junaĝa Verkaro"—Edmond Privat. Prologoj de J. Baghy kaj K. Kalocsay. Eld. STAFETO: J. Regulo, Tenerife. 144 p., 1.20 Usonaj dol.

Estas instrue, kompari kun nuntempaj verkoj tiujn ĉi paĝojn el la frutempa artlaboro de nia pioniro. Estus tikla tasko, trovi en la tuta kompilo vorton ne ĉie komprenatan de simplaj E-istoj . . . kaj la teksto prezentas ĉe ĉiu ekvido formojn sukajn, trafajn, spontane impresajn.

Pri la enhavo: Nur 18-19 jaraĝa, Privat verkis la ĉiiverse klaran "Ginevra", rigore uzante nur la tiaman vortprovizon de la lingvo. Per tiu modesta vortstoko li bele sukcesis elesprimi ĉiun koncernen penson kaj agon en lirika dramo ĉiel taŭga por teatro. Tiel same pri la proza kaj poema partoj.

Lia emo al la kernece kurta frazo frape montriĝas en la noveleto "Tamen Perdota"—tiel okultire, ke la kompostajo aspektas kurioza, propre stilisma. Transiĝis en lian "Vivo de Zamenhof" tiu sintaksa simpleco, cetero plaĉa por multaj legantoj.

"Ginevra" estas unu el la plej bonaj verkoj en senrima metriko. Kristale klara laŭ senco, vere poezieca en stilo-formo, kaj teme trafa, etos-elvoka, ĝi estas perlo de nia originala literaturo. Ĝi rememorigas pri la konata "Idilioj de la Reĝo", de Tennyson, kaj rajtas favoran komparon eĉ kun tiu fama poemciklo. Mankas al ĝi la pensa kaj psika subtileco de la similaj verkoj de Shakespeare kaj Spenser. Tio donas al ĝi facilan komprenatecon eĉ por ne tre progresintaj E-istoj.

Ĝi estas simpla rakonto pri honesta sed edze naŭva reĝo, la amo de Lanceloto kaj Ginevra la reĝino, la ruza fi-volemo de Modredo, kiu spionas al ili, motivata de sia malamo al Lanceloto, kaj la katastrofaj sekvoj de ilia intima korrilato.

Arturo, tre aferplena regnestro, ne volis dividi kun sia helpema edzino siajn reĝdevajn zorgojn, kaj konfidis ŝin al la kompanieco de fidmerita kavaliro, Lanceloto, komisiante lin

"distri la Reĝinon mialoke". En tio li agis—kun terura rezulto—simile al la Malprudenta Scivolulo en la novelo de Cervantes.

En ĉi tiu revizio de la eldono de 1913j. estas ŝanĝitaj: 96: tritiko, greno (anstataŭ frumento) kaj 29: lasas nian Reĝon (lasas Reĝ' Arturo).

Atentigoj: 24: la fervora epoko . . . kiu envidis (?) tiom da entuziasmo: enhavis? 27: (ajoj) amasitaj. Tio rajtigus "amasi" kiel transitivan verbon. Komparu: simplitaj (simpli); koloritaj (kolori). 45: teruriga (terura); 75: naŭzigan (naŭzan); 106: nauziga (nauza); 126: kornauzige (kor-naŭze); 79: vervenaj (verbenaj?); 77: . . . revulo, rutinon lacega . . . Do, sata ĝin, ebria vinon? 53: meznokta (noktomeza). 31, 55: kvarcentjare (— jarcente); centjaroj (jarcentoj); 113: profundaj bonodoroj (Kio estus malprofunda bonodoro?). Kial ne "svenigaj bonodoroj"? Aŭ ĝudolĉaj, ĝusentaj? 121: nombrafoje (multafoje); 137: sub (en?) la tomboj. Komparu: en tombo (72); 110: antaŭ veni (antaŭ ol veni).

Entute, bonega verko, tute rekomendinda.—F.R.B.

Julie Ŝupichova estas jam E-istino de 55 jaroj, kaj ankoraŭ verkas en "La Praktiko" kaj aliaj gazetoj, malgraŭ sia nefortika sano. UEA stokas ŝiajn librojn: "Ni Legas kaj Lernas", E-a legolibro laŭ la verkaro de Zamenhof, 3/8; kaj ankaŭ ŝian originalan kompilon de sama titolo: 2/3. Ni rekomendas ilin kiel ĉiusece aĉetindajn.

BULGARA PROZO

"La lingvaĵo de la tradukoj povas esti rigardata kiel tipa por la bulgaraj esperantaj eldonaĵoj: korekta gramatike, logika kaj libera en la frazokonstruo, fidela al la Zamenhofaj lingvotradicioj kaj samtempe akorda kun la ideoj de la modernaj korifeoj de la Esperanta gramatika scienco. En ĉi tiu senco oni povas paroli pri speciala 'bulgara esperanta skolo', kies modeloj estas sekvindaj ankaŭ por alinaciaj esperantaj lingvokulturantoj"—G. Zaljotov en "Nuntempa Bulgario" n-ro 12.

Pri tio multaj konsentas.

LA ESPERANTA BIBLIO

J. M. Warden, sekretario de la Esperantista Biblia Komitato, en sia raporto al la 18a Kongreso (Augusto 1926), asertis, ke "la traduko (de Zamenhof) estis finita en 1917, nur mallongan tempon antaŭ lia morto."

Jen la faktoj: La 3-an de Marto 1915 Zamenhof france skribis al pastro J. Cyprian Rust: ". . . kun granda plezuro mi povas sciigi al vi, ke la Malnova Testamento jam estas tute tradukita (kaj maŝine skribita). Por ke la tuta verko ĉie havu egalan stilon, mi mem tradukis ĉion". (Originala Verkaro, 472.)

La 9-an de Januaro 1917 Zamenhof germane skribis al Marie Hankel: ". . . Mia sanstato bedaŭrinde estas tre malbona. Mia traduko de la Malnova Testamento estas tute preta, sed ĝis la fino de la milito mi bedaŭrinde havas nenian eblon, sendi ĝin al la eldonistoj". (Orig. Verk. 567, 568).

En "Dia Regno" (4/59) Prof-o W. J. Downes: "Zamenhof finis la tradukadon de la tuta Malnova Testamento frue en 1915, sed daŭrigis reviziadon de sia traduko ĝis nur kelkaj semajnoj antaŭ sia morto la 14-an de Aprilo 1917."

Li ne povis finredakti la tutan tradukon; tion faris, laŭ lia peto, la Biblia Komitato en Britujo. Gi ankaŭ akordigis la koncernan tekston de la Nova Testamento, kaj la tuta Biblio estis presita en 1926.

POR VIN DISTRI . . .

". . . kiam oni, kiel mi faris, tralegis preskaŭ la tutan Esperantan literaturon jam de la 'Neĝa Blovado' ĝis 'En Okcidento Nenio Nova', oni vidas tre klare, ke la postmilitaj verkoj prezentas tre gravan antaŭenpaŝon kaj lingvoprogreson". — G. Waringhien, la 31-an de Marto 1932. P. 14 "Parnasa Gvidlibro".

Laŭ la E-Fr. Vortaro de Waringhien la radiko "konvert" havas religian, finanĉan kaj elektrofakan sencojn. La aŭtoro komentis en letero: "Mi opinias, ke . . . estas nenia okazo de konfuzo; do, kial ne kurage uzi la saman radikon? Aldoni novan sencan al unusenca fundamenta vorto tute ne estas novaĵo: tion Zamenhof mem plurfoje faris."

Associated Newspapers Ltd.

El letero de la eldonfaka direktoro: "Vi komprenas, ke la du libroj (Bildlibro pri Bestoj kaj Amuzo per Scienco) estis eldonitaj eksperimente. Ni forte bedaŭras, ke la ordinarnaj librovendistoj tute ne sentas intereson pri E-aj eldonoj. Tamen konsiderinda nombro da E-centroj sendis al ni mendojn, kaj se ni ricevos sufiĉe da mendoj tio eventuale kuragiĝos nin eldoni ankoraŭ pli da E-verkoj".

Leginte tion, vi certe konsideros la saĝon, tuj mendi la du verkojn, kiuj, ni certigas vin, tute valoras la koston kaj egale interesus junulojn kaj plenaĝulojn. Nesufiĉa aĉetemo nian parta certe perdigos al ni nian lokon ĉe tiu tre grava presentro.

MAREK WAJSBLUM, redaktoro de "The Worker Esperantist", koraŭtake mortis. Lia severa kaj serioza mieno povis timigi, je unua renkonto, sed konantiĝo kun li malkovris la gaje-bravan animon sub lia fiera kaj suferplena vizaĝo.

Neniamĉesa laboranto por Esperanto, li respondis al pledoj, de la edzino, ke li lasu ian Esperantan taskon, por konservi sian energion: "Esperanto estas mia ripozo, ĉar en tia agado mia tuta memo estas en harmonio".

CLIPPINGS

BIRDS.—An Esp. Bird Society formed: H. Tiepermann, de Bureestraat 28, Antwerp. A call for "cuckoo firsts" brought 160 replies from Esp-ists.

LETTERS.—"Nuntempa Bulgario" has 17 requests for correspondence from U.S.S.R., 9 from Czechoslovakia, 6 from Vietnam. Note implications here.

HAPPY MISPRINT.—A Csongrad (Hungary) journal promised an "espresso" bar for the town's culture centre. Printer's error made it "Esperanto", and the wide interest so aroused resulted in a class which will be the nucleus of an Esp. club.

PROVERBARO.—Order now the new edition of Zamenhof's collection of proverbs, published by Regulo Perez.—The above, culled from The Worker E-ist.

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 29 (109)

MELBURNO

Julio - Aŭg., 1962

I'M AN ESPERANTIST. WHY?

Diverse Motives Prompt Use of World Auxiliary Tongue.

Where do I fit in? There are (a) The idealists. They admire Zamenhof, share his noble desire to universalise a sense of fraternity, and speak much of "the inner idea", without, perhaps, having defined it in the wider context of Zamenhof's ideology. (b) The language amateurs, scholars or dilettantes, impressed by Esperanto's structural symmetry, artistic features and precision in expressing nuances. For them it is a marvellous instrument by reason of its form and functioning. (c) The users of Esperanto as only a means to an end—the wider dissemination of their own beliefs, fads and interests. Transport, commerce, ideology, politics, religion; reforms such as Gesell, Single Tax, Douglas Credit, Geonism provide instances. Collectors, philatelists and so on adopt the language to expand their area of search, and for this alone. (d) The realists. Esperanto is for them the ONLY solution at present available for the task of toppling Babel. They yearn to see Esperanto used everywhere and in any way, no matter what, so that mankind may be freed from yet another inhibiting chain and thus advance culturally and technically. Many in this category would urge also a world currency, one calendar for all, and the abolition of tariffs, customs, passports, &c.

In which group are you? Clear thinking on this would dispel much

misunderstanding as to what constitutes an Esperantist and lead to a generally accepted definition of the word "neutral" as applicable to Esperanto.

Perhaps many of us feel we do not fit neatly into any one category. Certain it is, however, that, like the telephone, the more Esperanto is used, no matter for what purpose, the better—practically—it is for a, b, c, and d.

Is it, then, wise to disapprove its use in any field? some may ask, quoting the Boulogne Declaration: "The term Esperantist is applied to everyone who knows and uses the language, Esperanto, irrespective of the purposes for which he uses it". Others, phrasing the question differently, could put it this way: "Is it fitting, is it right, that Esperanto should be used by men whose principles Zamenhof abhorred?" They could cite Zamenhof's words at the Second Congress, in which he expressed his feelings, not against the use of Esperanto by forces essentially evil, but by cold, legal self-interest: "If one should debar us from all idealism . . . we would tear off our green star . . . and cry with disgust: 'With such an Esperanto, which must serve exclusively the aims of commerce and practical utility, we have nothing in common'."

After studying the Second Congress speech, we may pose the question:

Which, if any, of the above categories would come within the searing range of those flaming words?

No matter how well an Esperantist uses the language, he may not claim to be an "Esperantismo" if he lack the noble motivation of its Initiator.

OPEN LETTER

Extract from Dr. A. Albault to Prof. P. Burney.

"You say that Esperanto 'has a relatively poor number of roots (about 2650)'. The figure is correct, but it is that of the roots contained in the Universal Dictionary in five languages—in 1893! I inform you that the number of roots sanctioned by the Esperanto Academy is at present 4529, which figure corresponds (by derivation) to some 60,000 words. Every living language, however, pays little attention to official institutions, and the number of roots in current use is certainly higher, since one of the most used dictionaries, wholly in Esperanto, contains almost 8000 roots, giving by derivation a vocabulary of some 120,000 words.

"Further, a quick calculation reveals that the great Esperanto-French dictionary of Prof. G. Waringhien contains definitions of 17,500 roots, giving by combination, &c.—420,000 words. And please note that this dictionary is far from being exhaustive. To acquaint yourself with certain fields, and especially the language of science and technology, you must turn to those of 120 sectional dictionaries.

"A terminological centre co-ordinates the work of those who prepare such sectional dictionaries. This intense lexicographical labor is apart from the production of bilingual dictionaries in the many tongues." (The full French text is in "Revue Française d'Esperanto", June, 1962.)

PAĜO 84

(6/60), kol. 1, 6 de la malsupro, la vorto "senpune" ŝajne forfalis el la teksto antaŭ "flatas". La senco: Kiuj flatas (aŭ fi-plaĉas) al diktoroj, tiuj fine suferos. Tiel aginte koncerne la Nazian oligarkion, Britujo k.t.p., pro cinika politiko de siaj gvidantoj, ricevis bombojn—kaj nun staras antaŭ la krianta demando: kiel forigi la orientan limzonon Germanan.

PRI MANUSKRIPTO

S-ro Hans Welling, Bad Neuenahr, skribis al S-ro A. Holzhaus, 25 XI. 61, "Zamenhof, diabetulo, venis al Bad Neuenahr kaj loĝis ĉe Villa Erna. Kuracis lin D-ro Friedrich Bluth, tre kompetenta banloka kuracisto, Judo el Supera Silezio. Mi estis amiko lia, kaj li multe min informis pri L. Zamenhof, interalie, ke, kiam Zamenhof jam sian Esperanto-verkon havis prespreta, li transdonis ĝin al la patro, por opiniesprimo. Tiu tamen ne havis simpation pri la laboraĵo de sia filo kaj kolere ĝin disŝiris kaj bruligis".

En 1937 pastro Dombrovski ricevis detal-memoraron de la familio Zamenhof, per kiu li informiĝis, ke la patro detruis la verkon **du fojojn**. "Deveno kaj Vivo de la Lingvo Esperanto", p. 43 (Stojan).—P. 128 "The A.E."

KONGRESA SEKRETO?

N.Z. Maimon en "Nica Lit. Revuo" N-ro 38 pretendas ĵeti lumon sur la ne-ĉeeston de Ludoviko Zamenhof (nepo de la Majstro) ĉe la Centjara Kongreso 1959. Li citas el Jida ĵurnalo "Forverts" (Nov-Jorko), kies raportisto intervjuis en Varsovio la edzinon de tiu nepo. "Si rakontis, ke en Januaro 1940 D-ro Adam Zamenhof (ŝia bopatro) estis mortpafita de la Nazioj" Siavorte: "La Nazi-oficiro, kiu venis en la domon . . . por lin aresti, komencis interparoladon kun sia viktimo en plej afabla maniero, en flua Esperanto, sed je la fino li sciigis al li la arestordonon en germana lingvo".

Maimon komentas: "Ke Esperanto servos tian perfidan servon—ke troviĝas Esperantisto, kiu transdonos la filon de la Majstro en la manojn de la satano . . . ni eĉ en niaj plej teruraj sonĝoj ne antaŭvidis!"

S-ino Zamenhof konfidis al la raportisto de "Forverts" sian senton, ke povus alesti la Kongreson ankaŭ homoj, kiuj partoprenis la ekstermon de la Varsovia geto.

Kion la nepo mem vere pensis? ("Esperanto", Dec. 1959).

Komparu: Aprilon 1917. Esperantist Majoro Neubarth, la Germana oficiro ĉe la Varsovia haveno, amikis kun la Majstro, kaj kun alia Germano, reprezentis la alilandajn Esperantistojn ĉe lia entombigo.

PRI GOERING

(vidu p. 174) Kial Esperantistoj citu "aŭtentan" dirajon de murdisto kaj militkrimulo? Kian rilaton li havis al nia movado, krom ke lia partio malpermesis nian lingvon, bruligis niajn librojn, enkarcerigis niajn anojn??

Cu "revolvero", ĉu "Browning" tiu rabisto, kiun la internacia kortumo de Nuernberg kondamnis al mortpuno, pensis nur pri la pafilo. Vere strange nur estas ke gazeto kiu pro spacomanko ĉiam devas uzi aĉajn mallongigojn kiel "Uni." aŭ "Espo", disponigas lokon al aferoj tute sen rilato al Esperanto!

—Herbert Koppel, Melbourne.

Nia amiko ŝajne miskomprenas. Ni volis: (1) rakonti pri vortludo—"Browning" (poemlibro, kaj ankaŭ revolvero). Cu Goering diris: pafilo, aŭ Browning (la dusenca vorto)? Ja temas pri "kulturo". (2) Se Germano certigus pri la aŭtenta diro, tio estus reklamo por Esp-o kiel internacia helpfaktoro. Ĝi do efektive havas rilaton al Esp-o.

Ciu ĵurnalo uzas mallongigojn. Eĉ H.K. mem—en sia raportito sub "Perth" kaj "Melbourne".—Red.

KANADO

Esperanto ekmarŝas en Kanado—jam troviĝas en urbo Tri Riveroj Esperanto-Strato! La unua en tiu lando. "Kanada Esperanto - Revuo" estas bona gazeto. Akompanas la Mar.-Aprilan numeron aldonoj: "Esperanto Comments and Commentary" (Dorothy Henderson) kaj lingvos- truktura komparo de E-o kaj Interlingua. Anglalingve S-ino Henderson raportas pri la 46-a Kongreso ĉe Harrogate. Legindigas ĝin ŝiaj vivece personaj impresoj. Bedaŭre ŝi kontraŭsece prezentas ciferojn pri lernejoj en kiuj oni instruas E-on. En ŝia kongresraporto: 400 lernejoj; 37 landoj; 14,000 lernantoj. En ŝia "Comments": 540 lernejoj; 27 landoj. La Jarlibro de UEA (1961): 380 lernejoj; 30 landoj; ĉ. 14,000 lernantoj. Eldonis: Esperanto Press, Oakville, Ontario.

La Svisa Poŝto kunlabore kun la Svisa E-Societo dum tri monatoj uzis specialan stampilon tekste: "75 Jahre internationale Sprache".

U.E.A. DELEGATES

In 63 countries—3049 of them; disc mentioned in our last number, France leads with 304, then Germany, 263; Sweden, 213; Britain, 187; Italy, 182; Holland, 180; U.S., 153; Poland, 134. N.Z. has 27, Australia 21.

—Jarlibro de U.E.A., 1961.

PYKE EXAMINATION

Last Sitting.

Prize winner: Mrs. M. McMullen (N.S.W.), with honors, 88 points. Certificate gained: Mrs. Betty Cleminson (N.S.W.), 71 points.

A.E.A. EXAMINATIONS

Passed (Elementa): With honors, Mrs. A. B. Sedgley, Mrs. R. McGrath, Messrs. W. L. Illingworth, R. Harry, R. Hanney.

Misses A. Longson, D. Leach, Mrs. E. Pianta, Mrs. E. L. Palmer; Mr. G. E. Lancaster.

Passed (Supera): With honors, Mesdames R. McGrath, A. B. Sedgley; Messrs. R. Harry, N. W. Russell. Messrs. F. Mueller Sarau, I. T. Madern.

Passed (Klereca): With honors, Dr. C. J. Caldera, Messrs. K. G. Linton, L. N. M. Newell, F. R. Banham.

Address, commissioner for examinations, Dr. C. J. Caldera, 91 Smyth Rd., Nedlands, W.A.

VUNDITA STRIGO

venis en mian domon. Mi ne sciis, kion fari, do mi telefonis al la bestgardeno. Oficisto tie min petis, porti la birdon al tiu loko. Mi kun ĝi tien aŭtis, kaj eksciis, ke antaŭe nelonge mortis la ino de la tie-ĉanta strigo. Ĝojsalte la direktoro bonvenigis mian birdon. Jes ja, ĝi estas birdino!

MANGADA?

En "The March of a Nation" (1937), H. G. Cardozo plurfaje draste menciis lojalistan defendanton: Kolonelo Mangada. Cu tiu estas nia fama E-ista redaktoro, poeto, verkisto? Julio Mangada Rosenorn naskiĝis en Kubo 1887, servis en la interna milito Hispana, fuĝis al Orano, de kie li iris Meksikion, kaj tie mortis.

WUPPERTAL

Dua E-a prospekto. Pro la eksterordinara sukceso de la unua eldono,

Australia Kroniko

● **BRISBANE:** Instruado daŭras en la kunveno de la Brisbana Societo, sed ĝuste pro tiom da instruado ne estas eble aranĝi interesajn aferojn por progresintoj, kvankam la Estraro konsideras luon de dua ĉambro, kie progresintoj k.t.p. povos perfektigi lingvoscion kaj eble ĝui distraĵojn.

Prez. Gunster (12/7) televid-intervjuigis pri Esp-o ĉe la Nacia Stacio.

Fine de Marto, Japana inĝeniero, S-ro T. Kawai, vizitis Brisbanon. Pro tre mallonga restado de lia ŝipo en la haveno, ne estis eble kunvoki Societanojn; por lin renkonti. Tamen, laŭ invitletero, la delegito vizitis S-ron Kawai kaj salutis lin nome de la U.E.A. kaj la Brisbana Societo.

● **ROCKHAMPTON:** S-roj Petley kaj Russell daŭrigas la instruadon, kaj intereso pri Esp-o estas tiom forta kiel antaŭe. La redaktoro de ĉiutaga ĵurnalo, Rockhampton Morning Bulletin, propravole kaj neatendite verkis dukolumnan ĉefartikolon pri Esp-o, dirante, ke jam ekzistas mondbezonata lingvo, ĉiel taŭga por internacia uzo. Li alvokis por tuj alpreni de Esp-o, avertis kontraŭ malŝparo de tempo ser.ĉi novan (aŭ mortintan) lingvon por internacia uzo, kaj konsilis, ke oni adoptu tion, kio estas jam de longe pruvita kaj tute preta.

S-ino V. Fraser, diplomito de Csehkurso, komencas instrui al dek personoj en Redcliffe. Inter ŝiaj lernantoj estas konsilanto de loka urbo, kuracisto kaj aliaj bonekonataj personoj.—S.L.P.

● **PERTH:** Du konversaciaj vesperoj donis eblecon al la partoprenantoj praktiki la lingvon kaj pasigi agrablajn vesperojn. Krome okazis Diskutvespero (21/6) kies temo "Maljuneco" multe interesis la anojn.

Jack Hawks alvenis en Usono kaj vizitis la grupojn en Nov-Jorko, Washington, Los Angeles kaj San Francisko. Ĉie la samideanoj akceptis lin kore. De Usono li vojaĝis al Japanujo, kie li ĝis nun nur renkontis E-istojn en Kobe.—H.K.

● **MELBOURNE:** Dum la pasintaj 3 monatoj okazis denove kelkaj interesaj prelegoj en nia klubo. S-ino Fay Koppel parolis, 14/5, pri la E-verkisto Ferenc Szilagy kaj pri lia libro "Inter Sudo kaj Nordo". S-ro

E. McKenzie (21/5) prelegis pri "Akvo-Transportado tra la mondo" kaj je 28/5 S-ro J. Ryding montris lumbildojn pri vojaĝo tra Hispanujo.

Pri "Mildura" parolis S-ro M. Leereveld (4/6) kaj S-ro F. R. Banham tenis nian intereson (11/6) kiam li prelegis pri diversaj interesaj aferoj. La ĉi-jara "Amerika Teo" okazis la 25-an de Junio. 45 personoj, kiuj alportis amason da donacoj plenigis la E-domon. Okazis loterioj kaj vendado de varoj. Fine, ĉiuj refreŝigis en la mangoĉambro. La rezulto de la vespero £31-18-0 reprezentas rekordon. Tiu sumo estos entute uzota por plibonigi nian bibliotekon.

Interesegán prelegon faris S-ro D. Broadribb (2/7) pri la "Mort-Maraj Manuskriptoj". Pri "Tasmanio", kie li loĝis dum kelkaj jaroj, parolis S-ro M. Leereveld (23/7) kaj je la 30/7 S-ro F. V. Taylor montris belajn lumbildojn pri siaj vagadoj tra Anglujo.

Gratulon al S-ro R. L. Cecil, kiu malgraŭ neebla partopreno en klubaj aferoj pro malfavora sanstato, tamen propagandas inter la membraro de la "Society for Better Hearing". Jam li prelegis pri E. ĉe ties klubo kaj en la aŭgusta n-ro de la revuo "Better Hearing" aperis artikolo de li.

En la junia kunveno de la REN-DEVUO S-ro J. Thompson el Newcastle, Anglujo, prelegis pri sia sperto en Esperantujo kaj en julio S-ro E. Hearne montris lumbildojn pri feriaj migradoj tra Tasmanio.

ROCKHAMPTON ESPERANTO CLUB

Approximately 40-50 people belong to the Rockhampton Esperanto Club, which held its Inaugural Meeting in November, 1961. General Meetings are held on the first Thursday of each month.

Classes are held every Thursday evening in the Adult Education Centre, East Street, Rockhampton. There are two classes—one for advanced students conducted by Mr. Russell, the other for students who enrolled at a later date conducted by Mr. Petley.

After the class students remain to have a cup of tea and are provided an opportunity to practise their oral Esperanto by conversing with each

other. It is interesting to note there are several children in both classes.

There is a library containing books and magazines which may be borrowed for a small charge. There are also one or two records which may be borrowed at a charge.

To date, apart from the normal refreshment after the class, the only social function we have arranged was an "Esperanto Sing-song" in the home of one of our members.

Office-bearers for our Club are:— President, Mr. H. Petley; Vice-President, Mr. N. Russell; Secretary, Miss F. St. Pierre; Treasurer, Mr. Craigue; Social Secretaries, Mrs. Roberts and Mrs. Connor; Librarian, Mr. N. Ware.

MALNOVAJ NUMEROJ POR KOMPLETO

La Kanbera Esperanto-Klubo, por kompletigi bindotan kolekton de "La Rondo", bezonas la sekvantajn numerojn: 1-12 (1947-48), 15, 18, 19 (1948), 26, 28 (1949), 39 (1950). Se iu leganto povus donaci aŭ vendi eĉ unu el tiuj numeroj la klubo estus treege dankema. Por eviti duoblan sendon b.v. unue skribu al: S-ro R. L. Harry, 8 Tennyson Crescent, Canberra, A.C.T., Aŭstralio.

ROTARIO. Kiu volas ricevi Franclingvan raporton pri Rotario kaj E-o? Sendis ĝin L. Duchemin. Tre utila por apostoloj. La aŭtoro verŝajne ne scias, ke Interlingue kaj Occidental estas unusama lingvoprojekto.

ADREŜANGO

Ankoraŭ unu fojon mi devas atentigi ĉiujn E-centrojn, ke mia adreso estas: 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria. Malgraŭ multa petado, sendaĵoj daŭre estas misedresataj. (Heidelberg ankaŭ taugas.)

DIAFILMO?

Pri Budapeŝto: Provekzemplero estos sendita ŝanĝe je libroj, fotoj. Elingva, 81 filmkubetoj. De Esp-a Grupo de Metiista Kooperativo, IV ker. Rezi Karoly u. 58 sz., Budapeŝto.

Recenzoj

LA ZAMENHOFA ESPERANTO

Simpozio pri -ATA/-ITA: De Hoog, Gregor, Kalocsay, La Colla, Lapenna, Nakamura, Schwartz, Pump, J. Regulo, Sonnenfeld, Waringham. Eldonis Stafeto, Kanariaj Insuloj. 338 paĝoj. 3 Us. dol.

Iu iam verkis simile ampleksan libron pri iu moda uzo ĉe le Latina; aliaj sendube pri ia struktura subtilaĵo ĉe vivanta lingvo. Jen per tiu ĉi volumego ni okupas ankoraŭ alian egalstupon kun la "naturaj" lingvoj.

En tio, kiom ĝi estas disputo inter kolegoj, la afero tamen estas bedaŭrinda. Certe estas, ke multmultaj homoj ne sentas malfacilon pri la uzado, kvazaŭ instinkte fidante al sia kapablo redoni la ĝustan tempindikon en la pasiva verbo. La Zamenhofa Biblio estas bona kontrolilo en tio.

Tie, kie temas pri daŭra efikeco de iu afero, oni povas sendiskute uzi la -atformon, ekze-e: "Estas malpermesate fumi ĉi tie". La malpermeso havas daŭran, valide-por-ĉiaman efikon, ĉu ne? (Ĉe Plena Gramatiko, par. 247, p. 261, vi tamen vidas la -itformon). Komparu: la cito el la Buljona Deklaracio.

"La infanoj de Izrael estu cirkumcidataj" (ĉiuj Izraelidoj, dum la nedifinita, senfina estonteco). Sed "La infanoj estu cirkumcidataj" (pri difinitaj infanoj—pri kiuj unu ago jam unufoje estu farita). Galatanoj 5/3: "Mi atestas al ĉiu homo cirkumcidata . . ." (t.e. "sub la leĝo de cirkumcideo").

Aliaj okazoj uzaj: temas pri difinita tempo. "Kiam mi vizitis la familion, la infano estis banata" (ago plenumata en tiu momento); sed, ". . . estis (jus) banita (ago jam farita)". "When I came home, the baby had been put to bed". (Kiam mi eniris mian hejmon, la infano estis (jam antaŭe) enlitigita). Sajnas, ke aŭ "jam" aŭ "antaŭe" estas necesa en tiu frazo. Iuj verkantoj uzus ambaŭ.

Ripeto, daŭro, konstanta efiko. Pri daŭro dum nedifinita, pli-malpli longa tempo: "Ne ridu! Tiu mia modesta amiko nun verkas libron, kiu estos laŭdata post 50 jaroj (kaj eble pli longe post tio)."

Genezo 17/12, 1: "Cirkumcidata estu ĉiu naskita en la domo (aŭ aĉetita per mono) . . ." (ripetota ago). Sed, "En tiu sama tago estis— itaj A. kaj lia filo" (unufoja ago).

Fab. de Anderson, vol. 3, 35/1: "Ne juĝu, tiam vi ne estos juĝata". Tute prave per tiu formo la redaktoroj de la Londona Biblio korektis ĉe Mateo 7/1, sed forgesis tion fari ĉe Luko 6/37. Grava ne estas la rezulto—kondamno aŭ malkondamno—sed la fakto mem, ke oni estas almetata al juĝo". Tiel rimarkis Waringhien.

Notinde estas, ke tie, kie oni uzas la imperfektan -adis, oni formas la pasivon per -ata. Ekzemple: "Moseo juĝadis la popolon"; "La popolo estis juĝata de Moseo".—F.R.B.

"FERMENTARIO"

De D-ro Carlos Vaz Ferreira. Tradukis el la Hispana Prof-o Manuel F. Menendez; reviziita de Prof-oj L. C. Porto C. Neto kaj Ismael G. Braga. Eld. Urugvaja E-Societo, Calle Yaguaron 1397, Montevideo. 264 p. 2 Usonaj dolaroj.

Honore al fama Urugvaja pensulo kaj celebre al la Zamenhof-centjaro, aperis la verko. Kolekto da pensoj de filozofo pri "ĉio sub la suno intelekta", jam de "pragmatismo de la sincereco", vojirade tra "eklektikismo", "dinamika futurismo", "aktuala paralogismo", "pseudo-humoro", ĝis "moralo kaj maltrankvilo".

Konsistigas la libron komentoj plimalpli subtile erudiciaj, sed tro fragmentaj, pri la verkoj de majstroj diversartaj, paĝoj de spekulativo el notlibroj kaj prelegoj, kaj iuj pli longaj pritraktoj pri la abstrakta pensado.

Eble pro lia "eklektikismo", estas malfacile klare skizindiki pri la esenca penssistemo de la majstro, aŭ prezenti koheran bildon de lia koncepto pri la homa naturo kaj destino. Lia baza vivsinteno ne estas nete prezentita, per facila esprimmaniero. Saŭmas, fermentas. Al ties konstrua pritakso faras gravegan diferencon, ĉu aŭ ĉu ne oni rigardas la homon kiel efemeran vivulon, aŭ kiel personon dotitan per animo neperebla. Alivorte, ĉu homo estas nur "polveca" akcesoraĵo al portempa planedo fine dissolvigonta. aŭ Di-elektita spirito,

kiu progresos—sub alia manifestajo—tra senfinaj sferoj kaj epokoj. Estas abismo fiksita inter la du pensokoloj—la teisma kaj la racionalisma, kiu eterne baros sintezon de vivkonceptoj.

La verkon legos kun kompreno nur tiuj, kiuj jam sin trovas "hejme" sur la filozofia kampo. Intelekto kaj spirite ili bezonus internajn kapablojn, por vekti simpation kun tia legmaterialo. Jen bedaŭrindaĵo, ĉar tio supozinde limigos ĝian legatecon. Volonte ni trovas nin erara en tiu supozo, kaj esperas, ke inter ni estas homoj en ĉiu lando kapablaj, eĉ avidaj, sekvi la mensajn labirintojn de la genia psikanalizo.

Ekzemploj: p. 148: Li distingas inter la kredaj kaj la deziraj instinktoj pri senmorteco; sed mankas pozitiva konstato. Li ne atestas pri sia propra akcepto de persona starpunkto: ne donas rezulton de introspekta memanalizo de sia sento proprapersona. Li supozas, teorias pri la sentoj de aliaj homoj, ne malkaŝante la siajn, pri kiuj li pli prave povus paroli.

Legante Dickenson: ("Lia simpatioforto transpaŝas ĉiajn limojn. Aliaj bonaj aŭtoroj igas nin forgesi la malbonan parton de ilia produktado. Sed tiu ĉi—kaj tio estas grava—igas nin legi ĝin." La aŭtoro ne klarigas en kio konsistas la graveco. Jen ekzemplo de tre ofta manko ĉe niaj intelektuloj—ili ne pravigas siajn implicojn kaj aludojn. Cetere la fakto, ke homoj sentas sin sub ia anima apelo "legi la malbonan parton" nepre per si mem transformas la malbonan en la bonan. Tio, kio meritas, kaj ricevas, plezurajn legadon, estas iasence bona.

Tra la tuta verko oni trovas simile pensinstigajn paragrafojn, kaj pensemense dotitaj homoj ne ĉiam konsentos kun la honorinda aŭtoro.

"JUĜU MEM"

Dua eldono, reverkita, de kompleta surrigardo pri Ĉeĥoslovakio en ĉiaj aspektoj. En la unua eldono—80 paĝoj; en la nuna—110 plus multaj fotoj kaj mapo de la lando. Poŝformato, neta preso. Vere havinda ĉielfaka informilo. Unu respondokupono—ĉe Ĉeĥoslovaka Esperanto-Instituto, Blanicka 4, Praha 2.

Hungara Fervojista Mondo, revuo de la Fervojista Esperanto Movado. Responda Eldonanto: la Fervoja Sekcio de la Ministerio de Trafiko kaj Poŝto. Impresa organo, sub ŝtata egido. Kalocsay kontribuis poemtradukon (Arany)—La Kimraj Bardoj—tiel plenan de apostrofoj kiel simi-felo je puloj.

"Vegetarano": eld. A. Andriu, a Salusses par Montsales, Aveyron, France. Tre nete presita gaz., riĉhava por diete-sentemaj kaj korpekulturemaj mangantoj. N-ro 2 enhavas valoran biografion de la patro de l' "Vegetarano"—N.B. Havkin—animio nobla.

FILATELIO

La unua Ĉeĥoslovaka poŝtmarko kun Esperanta teksto. Por propagandi ekspozicion de la Ĉ.S.-posto estas eldonita serio de 11 p.m. Sur ĉiu troviĝas teksto en la Ĉeĥa aŭ Slovaka kaj responda traduko en unu el 10 lingvoj, inkluzive Esperanton.

Okaze de la Esp-a Fervojista Kongreso, la Hungara Poŝto eldonis Esperantan poŝtmarkon (unu-forintan).

ESPERANTO DISC

If you have not already ordered the disc mentioned in our last number, you should do so. We warmly recommend it. The fine voices of D. Rodriguez and Emilio Lapenna come clear as a bell. Unbreakable, 45 turns microgroove. 8/- and worth it. Editions Francaises d'Esperanto, 11 Rue P. Vergnes, Marmande, France.

EDWIN DE KOCK

en "Norda Prismo" 2/196 plendas pri "malagrablaj ripetoj" de samaj vortelementoj en unu frazo; "Tiu duopo de mal-vortoj agacas miajn dentojn". Li bezonus novajn dentojn, leginte ĉe Psalmo 10/3: "Pro la malboneco de malbonulo suferas malriĉulo". Zamenhof uzis 27 -ad en 24 sinsekvaj linioj ĉe "Rabeno de Baharah" (p. 8/9), kaj simile oftuzo oni trovas liaverke -ek.

Eraro preseja: P. 149, "1877" (legu: 1887).

"Esperanto, la lingvo internacia, facila por vi": Carl Walter. Amuza libro por lerni seninstruiste. Editions Nova, 40 Av. Gustav-Dollfus, Mulhouse, France. 120 p. 18 steloj. Ĉe nia agento aŭ UEA.

Tria eldono, reviziita. Destinata por internacia uzo laŭ la rekta metodo. Enestas 133 desegnaĵoj kaj antaŭparolo en E-o kaj 11 lingvoj. La prononco estas ekzempligita en 11 lingvoj, kaj Angloj per tio lernas, ke "eŭ" estas egale al "there rule"; "c" al Tsar.

MURDOCH ANSWERS . . .

The ignorance of the educated was evidenced recently by the coincidental bracketing of Esperanto with Volapuk by De Gaulle and Prof. Murdoch. Both these moulders of mass opinion revealed their abysmal obscurantism on the subject of equating a living language with a fantastic and arbitrary system that briefly appeared only to die within a decade, the 1880's.

"Le Monde," the most important of the French intellectual dailies, published a smashing rebuttal by the French Union for Esperanto of De Gaulle's absurd and defamatory assertions at the Press conference on May 15. The lingual imperialism implicit in the local balderdash deserves similar castigation. Such scribes are, at best, but unconscious mouthpieces for the small but mighty directing class that strives to guard its own interests, and so doing hinders true universal equality among nations and the formation of a global understanding.

TYRANNY OF TONGUES

"One has no need of Esperanto, because we have already a universal language, French": Gabriel Hanotaux, in 1921.

"One cannot admit Esperanto as an object of study in our State, for we have already a universal language, German": Hitler, 12 years later.

Today: The English and Americans assure us that Esperanto is useless, because the use of English is universal.

By what law of equality is French, English, German or Russian to be imposed as supreme over others?

These tongues are learned by smaller nations only with difficulty, and rarely well. Users of the minor languages will not tolerate a situation in which they are obliged to speak that of a great Power which they cannot possess perfectly. Why should they, in international contacts, be compelled to stutter their thoughts, ideas and propositions, while their favored opposites freely and eloquently voice their views in their mother tongue?

Let us have liberty, equality and fraternity among all peoples, by adopting a neutral, supranational speech, whose logical construction and clear pronunciation enable all to use it easily and without embarrassment.—E. Malmgren (Sweden).

KEARNEY, Elfric Leofwin.

1856-1913: Londona E-isto, tradukis la verkon de Lewis Carroll, "Alicio en Mirlando". Ĝi bone vendiĝis, kaj nun estas tre serĉata kolektista rarajo. Kial oni ne reeldonas ĝin?

La filo de Kearney estas ano de la Londona Klubo, laŭ informo de M. C. Butler (9 Mar. 62).

WINDS OF CHANGE?

Professor G. Waringhien's grim assessment of philologists' obtuseness as concerns Esperanto may soon need happy modification. "Bulgara Esperantisto" (July, 1960) has this to say: "In 1959 many language scientists publicly expressed a favorable opinion of Esperanto, and the hitherto customary silence or scepticism of professional and university circles towards a constructed international language and Esperanto in particular is gradually thawing." This paper cites highly appreciative comment by V. Georgiev (professor of linguistics at Sofia University) and Ivan Duridanov (instructor in the Philological Faculty at the same) in their book for students, Language Science, Sofia, 1959.

In "Kleine Enzyklopadie: Sprache, Schrift. . ." published by the German Democratic Republic, Leipzig, 1959, Esperanto is fairly and objectively treated—with its aims and attainments justly assessed.

"LA ESPERANTISTO"

En "Originala Verkaro", p. 57, Dietterle rimarkas: "Kompletajn jarkolektojn de tiu gazeto mi povas konstati nur ĉe tri personoj: Wm. Bailey en Manchester, E. de Wahl en Reval (Tallinn) kaj Eugen Wuester en Berlin" (skribita en 1929).

De Wahl mortis en 1948. Hilda Dresen informis al S-ro Holzhaus en Dec. 1961: "La biblioteko de E. de Wahl forbrulis dum milito—lia tuta domo kaj duono de la strato. Mi mem vidis surloke duonbruligitajn librojn, pli vere libropagojn—ankau Occidental. Mi prenis du duone bruligitajn pagojn por memoro".

W. Bailey mortis en 1946. Prof. W. Downes (xiv Fundamenta Krestomatio, 17a eld.): ". . . mi havas la felicton esti la kuratoro ne nur de la fama Konkordanco, kiun S-ro Bailey faris de ĉiuj jam eldonitaj verkoj de Zamenhof, sed ankaŭ de plej multaj el la libroj kaj manuskriptoj de S-ro Bailey."

Ĉu Wuester savis siajn jarkolektojn kontraŭ la Nazioj?

KABE — ZAMENHOF

Strange, ke troviĝas en La Leteroj de Zamenhof (Waringhien) neniu korespondado inter ili. Z. certe oftefoje vidis kaj havis rilatojn kun Kabe. Li kontrolis ties verkojn aperontajn ĉe Hachette; sed ŝajne perdiĝis leteroj, se ili iam ekzistis.

The report on Congress in the Harrogate paper says that "the only countries where Esperanto is now banned are Spain and Portugal". This cannot be true, as the Yearbook of U.E.A. devotes two pages to Portuguese delegates and nearly six to Spanish, and a large Esp. national congress was held at Mallorca in May. (A delegate, or "delegito", is one who, in his place of domicile, stands ready to help any fellow-member Esperantist.)

Barcelona International Trade Fair for the third time uses Esperanto.

"Esperanto" (4/61) has a list of towns with Esperanto or Zamenhof streets. In the April 1962 number there are at least 161 of such.

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15\$ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

No. 30 (110).

MELBURNO

Sept. - Okt., 1962

ESPERANTO AS A LITERARY MEDIUM

French Savant Refutes Meillet's Misleading Assertion.

Professor Meillet in his "Languages in the New Europe" opines that "Esperantists showed naivete when, for example, they translated in Esperanto great works universally known. Literature is the least of the uses in which an artificial language can be employed. In all that touches style, literature lives by the expressive value of the words and phrasing peculiar to every language. An artificial tongue is a fitting instrument for simple reporting of facts and ideas not too finely nuanced; but it is, in its nature, incapable of literary expression".

Professor G. Waringhien, in his "Eseoj", 230 pages in Esperanto, says the above text presents a dread warning to all scientists. It shows, by a striking example, how dangerous it is, even for the greatest, to speak of something they have insufficiently studied. Meillet grants to an artificial language the fields of everyday life, politics, technics and science. And such would indeed seem to be its primary function. But surely it is evident that if an international language is to give a clear exchange of ideas on those subjects, and exact rendering of contracts, reports and book reviews without danger of misapprehension, this it can do only by reason of the fixed definition of its roots, the richness of its vocabulary and the clarity, precision and flexibility of its syntax?

And are not all these qualities precisely the same as those that give literary value to the natural languages?

What is The Discourse on Method (Descartes) if not a scientific report? What is Les Provinciales (Pascal) if not a religio-political treatise? And who will deny that these two works form the base of French literary prose? Is not The Decameron in some sense a report on the everyday life of Renaissance Italy? And is it not the base of Italian literary prose?

If the famous professor had thought a little over those two facts, and had he taken the trouble to read, for example, the Congress speeches of Zamenhof, he might have judged otherwise.

Waringhien goes on to remark that Meillet supposedly includes linguistics, exegesis and so on as "non-literary", and that he admits the ability of Esperanto, in these fields also, to forward the work of all nations in scientific progress. Waringhien then asks: Would it be possible for an international language incapable of literary nuance to treat, say, the stylistic use of the passive in Latin or English, the synonyms of a Greek or Hebrew word, the phrasing of Plato or Paul; to define the exact meaning of this or that word in Thucydides, the eloquent or poetic effect of a line in Isaiah or Tacitus, the choice of a variant in Omar Khayyam?

We would add that Esperanto has done and is doing all these things. It has already made wide and valuable contribution to philology and literary form-criticism. The selectly edited "Esperantologio" series in the first, and commentaries by M. Butin (on "Faust"), D. B. Gregor (on works of Sophocles), Kalocsay and Waringhien (Baudelaire) in the second, are but examples of Esperanto's growing output open to the exploration of all interested enough to learn the language.

Until our ill-equipped critics bring themselves to do this, and thus fit themselves for honest appraisal, we must continue to present the truth to a blinkered obscurantism that cannot, because it will not, familiarise itself with the very points at issue.

OOMOTO

F. R. Banham, 31 St. Andrew's Avenue, Rosanna, N22, Victoria, estas agento por "Oomoto Internacia". 12 steloj (9 ŝ. Aust.).

ITA/ATA

Pri la demando ni ricevis cirkulerajn aŭ pamfletojn de Jung, Waringhien, Lapenna, Perez, Manders, Schwarz, Carlen. Ankaŭ asociajn rezoluciojn de la Sveda, Norvega, Belga, Franca, Germana. Iuj el la dokumentoj pledas por la propra partio; aliaj pli-malpli kompromise konsilas fari ĉeson de la disputo.

Manders prezentas nepartian pritakson, kaj Carlen objekte proponas solvon provizoran.

EDUCATION

The Greek Education Ministry by directive June 26 strongly supports optional instruction of Esperanto in all national schools.

KABE CONQUERS

"La Revuo" (Sept. 1908) gives the result of a ballot on "Who is the best Esperanto stylist after Zamenhof? Of 267 votes, Dr. Kazimir Bein ("Kabe") took 194. He was followed by Dr. Vallienne, 31; De Beaufront, 7; Kofman, 5; Boirac, 5; Hodler and Grabowski, 3; Inglada and De Menil, 2; several with only one.

Australia Kroniko

● **MELBOURNE:** Tre varia estas la ĉiulunda programo de la Melburna Esperanto-Klubo. Nia redaktoro, S-ro F. R. Banham, faris interesan prelegon (6/8), kies ĉefa temo estis pri la E-verkisto Kabe. S-ro D. Broadribb prelegis (13/8) pri Usonaj Universitatoj; S-ro N. Perkins pri la nuntempa Cinujo (20/8) kaj H. Koppel kun lumbildoj pri Nov-Zelando (27/8).

La klubestraro decidis ke ni regule aranĝu prelegojn pri Esperanto-poezio kaj jam okazis 3 prelegoj: D-ro A. Fridenbergs (3/9), S-ro M. Leereveld (10/9) kaj F-ino Elsie Godfrey (1/10) estis la parolantoj. Bonvena vizitanto ĉe nia kunveno de 24/9 estis eks-A.E.A.-Prezidanto S-ano Ralph Harry (Canberra), kiu okaze de vizito al Melburno ne preterlasis la okazon viziti kaj alparoli nin. Samvespere, S-ro J. Ryding montris lumbildojn pri vojaĝo al Kvinslando kaj ankaŭ rakontis pri sia vizito ĉe la tre vigla nova E-klubo en Rockhampton.

Ĉe la aŭgusta kunveno de la REN-DEVUO, la parolanto estis D-ro Fridenbergs. La temo de la prelego estis "La Libera komerco kaj la komuna merkato." Li priskribis la ekonomian kunlaboron inter Belgujo, Nederlando, Luksemburgo, Francujo kaj Germanujo. Tre interesaj estis liaj asertoj pri la morala flanko de la komuna merkato kaj li diskutis la eblajn sekvojn se ankaŭ Granda Britujo aliĝos al ĝi.

En Septembro S-ro D. Broadribb parolis pri la "Literatura valoro de detektivaj romanoj." Li faris kelkajn rimarkindajn komparojn inter usonaj kaj britaj detektivaj romanoj.

● **PERTH:** Teatreta vespero aranĝita de S-ino R. McGrath (16/8) konsistis el 2 amuzaj dialogoj. Poste S-ino McGrath legis kelkajn elĉerpajojn el poemoj.

Okaze de la vizito de la Reĝo kaj Reĝino de Tajlando (11/9), la E-Ligo de Okcidenta Aŭstralio estis reprezentata ĉe la Urba Akcepto per 4 delegitoj (S-inoj Ames, Brown, Dean kaj F-ino Longson) La akcepto okazis en la bele ornamita Capitol Teatro.

"Printempo" estis la temo de nia konversacia vespero (6/9). Ĉe la diskutvespero (20/9) ni diskutis; ĉu la angla taŭgas kiel internacia lingvo; ĉiuj konsentis ke nur Esperanto, pro ĝia neŭtraleco, meritas esti la internacia lingvo de l'estonteco.

Pro nesufiĉa financa subteno, la projektita fondo de Esperanto-Kooperativo kaj aĉeto de domo (kiel en Melburno kaj Sidnejo) ne povas okazi nuntempe.

● **HOBART:** Ni bonvenigis S-ron J. Gibson kaj F-inon F. Downes, kiuj antaŭ nelonge venis Tasmanion de Anglujo. Ili loĝas en Launceston, sed tamen veturis al Hobarto por viziti nin. Ili estas entuziasmaj samideanoj kaj ni tre ĝojis renkonti ilin. Ankaŭ vizitis nian grupon kelkaj E-lernantoj el la Kvakera Lernejo. Ili amikiĝis kun la grupanoj kaj verŝajne ĝuis la kunvenon. (1/6/62).

Grandnombre la grupanoj kolektiĝis je 5/7/62. Denove S-ro J. Gibson kaj F-ino F. Downes venis el Launceston kaj ankaŭ Mario Gibson, filino de S-ro Gibson. Post kantado de "La Espero", S-ro G. Lancaster kaj S-ro Gibson faris sonbendojn. Tiu de S-ro Gibson estos sendita al Stockport (Anglujo), de kie S-ro Gibson venis. Ĉiu grupano salutis la Stockport-anojn kaj donis kelkan informon pri Tasmanio. Ni esperas ricevi reciproke sonbendon de ili. Denove ĉeestis junulinoj de la E-klaso en la Kvakera Lernejo. Ili studas por la "Schools Board" ekzameno pri Esperanto, kiu okazos en Novembro.—ALDO.

● **NEWCASTLE:** La Newcastle Esperanto-Klubo havas proks. 10 membrojn kaj kunvenas regule ĉe la Laborista Eduka Asocio (W.E.A.)—B.C.

● **SYDNEY:** (18/6-3/9). Dum la vintraj vesperoj la ĉeestantoj malpliĝis, tamen pli multe parolis Esperanton. Sed kelkaj programoj suferis pro manko de preparo. Sep anoj, plejparte tiuj kiuj ne kutimas fari programojn, paroladetis diverse kaj interese (25/6). Prelegis F. Dunn pri "La plej terura lingvo"—la angla (18/6); S-ino Browne pri sia ĵus lasita hejmlando, Sudafriko (16/7); kaj ju S-ro Jaffray, anglalingve, pri vege-

tarismo (9/7). S-ro W. Amies montris lumbildojn pri Kolorado, kaj iomete parolis (30/7). S-ro F. Mueller Sorau, je kutime alta nivelo, prezentis programon "Virtuozoj", per gramofono kaj parolo (13/8). S-ro V. Guelting denove demandis "Ĉu vi scias uzi vian vortaron?" (6/8). F-ino R. van Ryswyk estris societludojn (2/7), kaj cerbogimnastikon (20/8). Okazis du tielnomataj "debatesperoj", sed la unua estis hontinda haoso (23/7), kaj la dua nur agrabla rond-diskuto (27/8). Oni diskutis la A.E.A. ekzamenojn (3/9), kiam la plimulto esprimis malaprobos. Pri la du amuzvesperoj (4/8, 1/9), mi scias nenion.—F. M. Dunn.

CINIO RENKONTAS AŬSTRALIANOJN

Antaŭ ne longe venis en miajn manojn la romano "Say No to Death!" (1) de Aŭstralia verkistino Dymphna Cusack. Tenante ĝin, mi senkonscie ekmemoris pri ĝia aŭtorino, kiun mi renkontis en Pekino aŭtune de 1956. Kun ŝi estis ŝia edzo, Norman Freehill, ankaŭ profesia verkisto.

Nia renkonto estis hazarda, sed tamen interesa. Mi estis iranta sola sur ĉefstrato de Pekino. Subite mi ekaŭdis iujn interparoli Angle malantaŭ mi. Scivole mi turnis la kapon, kaj mia rigardo ektuŝis varmajn rigardojn de mezaĝaj kaj simpatiaj eksterlandaj geedzoj. Vidante min, ambaŭ montris al mi tre afablan rideton. Kuraĝigite de ilia ĝentila gesto, mi ekdemandis iom ĝene en la Angla: de kie ili venis?

"El Aŭstralio", la sinjoro respondis ĝentile. Aŭdinte min paroli Angle, kun ĝojo li etendis al mi la manon, kaj lia edzino, alproksimiĝante al mi, etendis la manon ankaŭ. Kaj ni kune ekridetis.

Tiamaniere ni konatiĝis, kaj daŭrigis la promenadon kune. Post kelkminuta interparolo mi eksciis, ke ili estas verkistoj, venis en Ĉinion por kolekti materialon por verki libron pri Ĉinio. Dume, ili afable donis al mi aŭtografojn en mia memorlibreto.

Ili ekadmiris, ke mi povas flue paroli Angle kaj demandis min: ĉu mi ĝin studis en eksterlando? Mi diris, ke ne; ke mi studis ĝin en Ĉinio, sed ofte havis okazon ĝin paroli kun fremdaj amikoj.

"Ĉu al vi plaĉas Ĉinio?" mi demandis.

"Treege!" ambaŭ respondis entuziasme. Ili diris al mi, kiel ilin enŝoris la Somera Palaco, Ciela Altaro kaj la grandioza Ĉina arkitekturo, same ankaŭ la glora Ĉina tradicia kulturo. Ili jam vizitis multajn landojn kaj diris al mi, ke Ĉinio estas la plej bela, kaj esprimis deziron ĝin ree viziti post nelonge.

Ni babilis ĝoje dum la promenado kaj tute ne rimarkis, ke ni estas jam ĉe la enirejo de la hotelo, kie ili nun loĝas. Ĉe l'disiĝo ili kunpremis mian manon tre varme kaj sincere. Mi deziris al ili bonan vojaĝon kaj sanon, kaj ili dankis min pro la akompano kaj deziris al mi sukcesojn en la studo. Tiamaniere ni disiĝis en sincera amikeco.

Kvar jarojn poste, en 1960, en la libroj de la bela ĉemara urbo Cintoa, mi hazarde vidis poŝformatan libron "China: All About It" (2), eldonitan en Berlino. Kun surprizo mi vidis la nomon de Norman Freehill sur la kovrilpaĝo. Mi vere miris, ke en ĝi estas kolektitaj tiom da materialo pri Ĉinio, pri ĝia historio kaj kulturo, kaj ankaŭ raraj Ĉinaj antikvaj artreproduktaĵoj.

Unu jaron poste, en Tientsin, mi vidis la imponan verkon "Chinese Women Speak" (3) de Dymphna Cusack eldonitan en Sydney. Jen ili ambaŭ plenumis la deziron — verki librojn pri Ĉinio!

Hodiaŭ, legante la kortuŝan romanon "Say No to Death!" mi refoje ekmemoris pri S-ino Cusack kaj ŝia simpatia edzo S-ro Norman Freehill. Mi sentis min tre feliĉa, ke mi iam ilin persone renkontis en Pekino! — Armand Su, juna Ĉina E-isto, membro de UEA.

- (1) Al la Morto respondu: Ne.
- (2) Ĉio pri Ĉinio.
- (3) Ĉinaj Virinoj Parolas.

MOMENTA REVO

Poŝtkarton belan mi ricevis de blonda amikino kara, kaj senkonscie mi ekrevis pri la fabela land' transmara. En sonĝo vidis mi ŝian imagon; vualis ĝin beleco ho tre ĉarma. Kaj ree ĝuis mi la dolĉan tagon de nia virga ambrakumo varma.

—Armand Su, Tientsin.

Recenzoj

OTELLO, LA MAŬRO DE VENECIO: Shakespeare. Elangligo, enkonduko kaj notoj de Reto Rossetti. Antaŭparolo de Roy Walker. Stafeto, J. Regulo, eldonejo: La Laguna, Tenerife, Canary Islands. 208 paĝoj. Prezo 1.80 Us. dol. aŭ egalvaloro.

Tiun tradukon povus recenzi du homoj: unu, kiu kvazaŭ parkere scias la tekston, havas kleron pri la lingvaĵo, aludoj kaj entute la spirita kaj materia fono de la mondfama poeto, kune kun ties tempo kaj verkmedio. Per liaj komentoj kaj observoj oni povus gajni gustan aprezon pri ĝia teksta kaj metrika fideleco, ĝia redono de la efektiva "aromo" de la mirinda originalo. Oni povus decidi, ĉu aŭ ĉu ne rigardi la tradukon kiel valore findindan interpreton, kiu meritis komparon kun la plej bonaj nacilingvaj tradukoj de la verko. Lia taks-normo estus literatura konveneco kaj artisma celatingo.

La dua recenzanto prefere estu simpla homo, kiu ankoraŭ ne legis la verkon. En lia kapo ne rondirus eĉ eheto pri la teksto. Por li ĉiu vorto kaj penso en ĝi estus freŝe noveveninta, neniam antaŭe legita. Li venus al sia tasko kun menso, kiel blanka folio, kiu staras preta por rekte ricevi la impresojn sen kondiĉanta antaŭkono. Lia merito aŭ utilo kiel recenzanto kuŝus en tio, ke nur per sia virga memorstato li povus pruvi, ĉu aŭ ĉu ne la traduko sukcesas en tre grava funkcio: doni klarkompreneblan kaj facile legatan tekston al homoj ne sciantaj la originalon. Lia juĝnormo estus rakonta plezuro kaj liberflua senc-enpreno.

Jen bona plenumo! Tamen kompreneble estas dubinde, ke en ĉiu okazo tio donas ĝustan indikon pri la enhavo de la originalo. Facileco povas signifi — falsecon. Bulthuis skribis en letero, ke, tradukante, li celis antaŭ ĉio doni interesan, facile senstreĉan legajon; kaj ofte kun intenco devii for de la tradukata teksto, por fabriki "fluan rakonton". Malfacilajn aŭ ne bone komprenatajn esprimojn li simple ignoris aŭ parafrazis laŭ propra kaprico. Tiu principo iufoje kondukis lin en absurdon, kio bone ekzempligas lia traduko de "Jane Eyre" (1931).

Ludfacile estas legi bone konatan verkon en lingvo, kiun oni iom sukcese studas—ekzemple, la Evangeliojn, legatajn de Anglo lernanta la Hispanan. La memoro—la internaj okulo—forte helpas, por prezenti la sencon en la lernata idioma, kvazaŭ la originalaj vortoj aperus sur paralela kolono.

La subskribanto sin konfesas mense parenca kun la dua speculo. Leginte la dramon antaŭ pli ol dudek jaroj, li trafolumis la Esperantan tradukon kun kapo virtuale senenhava je ajna frazo de iu Angla eldono. Tra la tuta verko li legis, kun atento, kaj—komprenis ĉiun linion. Senhezite oni rajtas diri, ke la traduko estas pli facile absorbata de matura Angla E-isto ol permesas tion la Sekspira lingvaĵo, kaj tre verŝajne tio validas ankaŭ por E-istoj en ĉiu lando respektive pri iliaj nacilingvaj tradukoj.

Jam arkaikigis multaj vortoj kaj esprimoj en la Angla, ekzemple: seel, agnize, besort, grize, haggard, ingener (tiu lasta mankas en la Oksforda kaj Webster'a vortaroj), whipster k.m.a. "Wear my heart upon my sleeve" (kravato!). Multo lingvaĵa jam perdis signifon por hodiaŭuloj. Rossetti remuldas forgesintajn formojn per fraptrafaj frazfiguroj, kiuj tuj sence sagas en la carbon. Gregor en detala tekstpriskribo ("British E-ist" 6/61) bone ekzempligas tion; ni preferas lasi al inteligentaj legantoj la plezuron malkovri la gemojn en ĉi-vastefunda mino.

Unufingraj Melodioj: William Auld. Poemoj. 126 p. Stafeto Beletraj Kajeroj 6. Eld. J. Regulo, La Laguna, Tenerife. Unu dol.

Ce kunvenoj de etika societo maljunulo kutime faris iun senenhavan rimarkon, tiam levis la manon, solene kriante: "Jen penso!" Iun tagon, kunano kolere atakis lin: "Je la bona Dio, ĉu vere vi nomas tion penso!"

Povas esti, ke nesimpatiaj legantoj simile reagos al tiu aŭ alia poemo en la nuna kolekto, rimarkante, ke jam iu komparis Auld kun R. M. Rilke, kiu ankaŭ verkis nur kompreneble por si mem. Brendan Clark asertis, ke: "sen ideoj poemo nenion valoras. Ĝi eble havas placan ritmon, tamen sen ideoj ĝi estas nura vortludo".

La temo de la granda poezio ne tre multe varias. La originaleco fontas el tio: esprimi ion pri kio la koro de ĉiu homo sentas sin en tia maniero, ke ĝi ankoraŭ denove konscias alfrontiĝi kun inda kaj adekvata pensbildo de komuna vivsperto: la ĉagreno de infano pri rompita pupo, la angoro de permilita perdinto, la ekstazo de feliĉa amplekto, la nigra malgajo de ama senreviĝo. Konfesinde, oni devas aldoni ankaŭ la simple erotikan, bazelementon, kiu obsedas kiom da milionoj . . . Al tiuj Auld provizis ekzemple Jasono, Poemo estas Koito, La Korpon Oni Venkis—pri kies estetika gusto kaj sana etiko oni povas diskuti.

Iom multe el niaj modernaj poetoj ĉefe penas esprimi humoron de cinika, vakua, antimetafizika venkitekco spirita—vestante siajn nebulajn pensvagojn per egale senkohera lingvaĵo. En ĉi-libro la aŭtoro, per sia vortuza virtuo, sukcesas eviti tion ĝis grado, kiu ekskludas lin ekster la ĉefmodeloj de tiu skolo, tamen foje minacas lin danĝero, ekzemple ĉe La Kvar Stadioj . . . kaj Noktaj Pensoj. Male la unuakta komedio estas sincera provo laŭ la klasika tradicio. Ĝi meritas zorgan legadon. Kaj ni dezirus, ke estus multe pli longa, do kompleta, la Gvidilo Tra la Angla Poezio, kies suprajaj sed traf-kernecaj pritaksoj instrue amuzas. Per "Kanto" Auld vinagre karikaturas homojn, kiujn li rigardas sklave dogmodoraj. La tono povas ofendi multajn, kiuj ankaŭ havas menson tiel egale liberan kaj penseman kiel pretendas al si la aŭtoro. Uzante la lingvan figuron de la poeto, ni dezirus, ke li ludu ne per unu fingro sed per ĉiuj. Per tio li verŝajne vibrigus pli funde la kordojn de la homa spirito.

John I. Francis kontribuis kleran kaj fundevidan skizon pripoezian, kun aparta analizo de la filozofia sinteno de la aŭtoro.

Nova Ezopo: Stefo Urban; Eld. Stafeto. P. 127, 1 Us. dol. Kurtaj rimajetoj, kies senco, pro troa lakoneco, plejparte restas nur ĉe la sprita aŭtoro. Studekzemplo:

Pompa
akompano,
trompa
ĉarlatano.
Vero

kun probable,
ero
de diablo!

Ni dezirus dividi kun la poeto la
ĝuan frapefikon, kiun la krisigno
atestas.

Virina larmo
fortega armo!

Tiu sagacajo okupas tutan paĝon.

Plaĉas al ni la Prologo, el kiu
ĉerpe:

Kaj Esperanton —
kia blago!
Ellernis mi en
duontago.

—F.R.B.

NOVAJ LIBROJ

STAFETO (Juan Regulo) prezentas: **Proverbaro Esperanta** (L. L. Zamenhof) alfabeto ordigita kaj analize kaj sinteze indeksita. Enkonduko de G. Waringhien kun antaŭparoloj de Marko kaj Ludoviko Zamenhof. 196 paĝoj. 1½ Us. dol.

Specimene: Parodioj kaj Pasticioj (Henri Baupierre). Per mirinde majstraj parodioj de prozo kaj poezio de 41 aŭtoroj, novaj kaj malnovaj, la diversaj stiloj kaj "fiksideoj" estas amuze imititaj. 138 paĝoj. 1.5 Us. dol.

Planlingvaj Problemoj (Esperanto kaj la Naturalismo)—William Gilbert. Lingvistika komparo de la skemeca Esperanto kun la naturalisma Occidental kaj Interlingua. Utila verko precipe por Esperantologoj. Antaŭparolo de D-ro W. J. Manders. 100 paĝoj. 1 dol.

La Profeto: Kahlil Gibran; el la Angla tradukita de R. S. Stone. Antaŭparolo de Elias Shamon kaj enkonduko de E. J. Lieberman, eminentaj Usonanoj. Per poezieca prozo tiu lingva artisto per juvelaj sentencoj mistike interpretas la misteron de l'vivo. 128 paĝoj. 1 Us. dol.

De la Federacao Esperanta Brasileira: **Kristana Agendo** (F. C. Xavier), trad. A. K. Afonso Costa. Spiritismaj aforismoj instiga al la Kristana vivo, privata kaj publika. Kelkaj estas reĥoj de konataj Novtestamentaj konsiloj, revestitaj per atentivekaj frazformoj. Precipe por introspektaj animoj, la verko bone servas por antaŭdorma legado, cele al provizo de edifaj songoj. 102 paĝoj. Prezo nemontrita.

Nia libroagento: Mrs. Milligan, 274 Mont Albert Rd., Surrey Hills, Victoria.

LINGVAJ NOTOJ

Laŭ Wm. Bailey la sekvanta eraro troviĝas en la originalo. Temas pri ". . . verkoj privataj, kiujn la esperantistoj . . . povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga" (la fino de la tria paragrafo ĉe la antaŭparolo al la Fundamento).

Laŭ la Plena Gramatiko (par. 303) kaj multaj ekzemploj de Zamenhof mem, la frazo devus teksti: ". . . kiel modelajn, sed ne kiel devigajn". Komparu: vi rigardu lian amon kiel kapricon (Z.).

Sen "kiel" oni povas uzi: Mi rigardas la agon peka. Ili rigardas versojn infaneca ludo. Si rigardas ĝin deviga.

"Popo" estas Grekortodoksa pastro —ne preseraro anstataŭ "papo".

"Matrikulo" estas (1) registro de membroj societaj, asociaj, universitataj k.s. (Millidge). (2) numero de la listo en kiu estas enskribitaj ĉiuj anoj de societo, organizo k.t.p. (P.V.) Matrikuli, aŭ studentigi ĉe universitato aŭ alia instruejo. "Matrikuli" ne estas limigita je universitatoj, sed estas aplikebla ankaŭ al kiu ajn organizo, kiu uzas tiun registroformon. Ekz., S.A.T. ĝuste uzas la vorton. Franco tradukus "to matriculate" per "admetre (un etudiant) a . . . ; etre admis a . . ."

"Konferanso" en "Belarto" (U.E.A.) supozinde signifas "comper" (lau la Angla senco!) aŭ "master of ceremonies". Ĉu "programer-vidanto", -anoncisto? Por "disc-jockey" eble "radia diskisto".

PASTORO

La nomo aplikigas nur al protestantaj pastroj. Ĉiu pastoro estas pastro, sed ne ĉiu pastro estas pastoro.

TRANSLATION COURSE

Monthly for advanced E-ists. 15/- yearly. Inquire at Editor.

"MONDA KULTURO"

Jam aperas, kvarfoje jare, internacia revuo pri literaturo, filmo, arto, k.a. Kunlaboras la plej elstaraj verkistoj kaj novaj talentuloj. Abono: 40 ŝil. Aust. ĉe UEA Rotterdam.

KURT JOSEPH HIRSCHL

En la 24a de Septembro forpasis el nia mondo nia estimata amiko, subite kaj pace. Li estis 71-jara.

El Germanujo li venis, en malfacila tempo, 1938, portante kun li la veran kulturon de granda popolo. Funde konante sialandan literaturon kaj abunde tradukante el Germanaj poetoj, li konstante revenis, kun ama dediĉo, al la verkoj de sia adorata Goethe. Cetere, la eposa Odiseado de Homero estis por li kvazau "biblio".

Veterano de la milito 1914-18 — severe vundita, honore ordenita — li spertis en propra korpo kaj koro la doloron de interhoma konflikto, kaj humanisme li longe sin okupis pri internaciaj helpmovadoj kaj la idealo de universala paco.

Penetre, antaŭvide li kritikis tendencojn en la politiko landa kaj monda, radike analizante situaciojn. Brave, konstrue li frontis la problemojn de la socia vivo.

Lia traduko de la Prologo al "Faŭsto" favore kompariĝas kun tiu de Bartelmes, kaj el liaj multaj tradukoj ni jene aperigas Soneton de Platen. Certe kun simpatio kaj intima sentemeco Kurt donis al ĝi la veston Esperantan:

Sopiropenas mia vivspirito,
Kaj daŭre celas en la malproksimon;
Pelate, devos mi forlasi hejmon
Lokitan eĉ en bela paradizo.
Spertante tiun premon kontinuan,
Mi scias, ke facile estas lasi
La karan patrolandon, kaj ekvagi,
Kaj malfacilas trovi hejmon pluan.
Sed kiu la malbonon maladoras,
El la patrujo fuĝos li pro tio,
Ke tie friponaro fia floras.
Pli bone fartos li en fremdnacio,
Ol tie, kie krude diktatoras
Malamo blinda nur kaj kalumnio.

Sinceran kondolencon al liaj parencoj kaj amatoj.

EXAMINATIONS

Mr. Herbert Koppel has gained the Diploma with honors for the Elementary examination of the A.E.A.

Further successes in next issue.

PRI ING. L. ZAMENHOF

Vidu paĝon 182. H. W. Holmes, vicprez. UEA, informas en "Nica Literatura Revuo" N-ro 39, ke "Amareco pro la suferado de la Zamenhofa familio dum la milito ne estas la kaŭzo de la forresto de Ing. Ludoviko Zamenhof de la Jubilea Kongreso en Varsovio en 1957. Tion pruvas la fakto, ke li estis aktiva ano de la Loka Kongresa Komitato, ĝis li profesie iris al Parizo baldaŭ antaŭ la Kongreso.

"Li aranĝis, ke li estu en Varsovio por la Kongreso, sed pro kombino da hazardaj burokrataj misfunkcioj oni ne disponigis al li sidlokon en aeroplano por gustatempe atingi la Kongreson, kaj, kiam en Varsovio oni komprenis, kio okazis, jam estis tro malfrue".

S-ro Holmes opinias, ke lia salut-telegramo atingis la Kongreson, sed perdiĝis en la amasego de telegramoj kaj leteroj, kiuj inundis la kongresoficejon en tiuj lastaj horoj. Estas juste, ke ni aperigas tiun informon.

ARANĜOJ POR KRISTNASKO

Se vi vizitos Melburnon dum la feria periodo kaj deziras kontakti kun Melburnaj E-istoj kaj viziti la Esperanto-Domon, ne pre telefonu S-ron W J. Drummond (Tel.: JA 3483) aŭ S-ron Herbert Koppel (Tel.: JM 1215).

BULGARUJO

Proporcio kun sia nombro da landanoj, ĝi estas eble la plej Esperantigita en la mondo. Societoj E-aj: 130. Membroj 5000. Oni celas ciferon 6000 ĝis la 48-a Universala Kongreso en Sofio (1963). "Nuntempa Bulgario" iras en 50 landojn kaj ricevis 5000 leterojn el eksterlando.

POEZIO

Preskau kiu ajn poemo povas aspekti ridinda, se oni ŝanĝas ĝian supran sencon en ordinaran prozon aŭ banalajn versojn. Nur provu tiel "traduki" la Odon sur Greka Urno (Keats) aŭ Al Alaŭdo (Shelley), por vidi kiel facile perdiĝas la magio kaj mistero? Kontraŭ tio la sincera Esperanta tradukanto konstante sin gardas.

EKZAMENOJ AŬSTRALIAJ.

Krom la ekzamenoj de la B.E.A.

- (1) **La Norma Elementa Diplomo** (N.E.D.), kiu certigas, ke la posedanto kapablas uzi la lingvon skribe kaj parole por la bezonoj de la ĉiutaga vivo.
- (2) **La Norma Supera Diplomo** (N.S.D.), kiu certigas, ke la posedanto, kiu jam posedas la Elementan Diplomon, kapablas uzi la lingvon por literaturaj kaj teknikaj temoj.
- (3) **La Norma Klereca Diplomo** (N.K.D.), kiu certigas, ke la posedanto tute kaj ĝisfunde scipovas la lingvon, kaj konas ĝiajn bazojn, historion kaj literaturon.

La kostoj estas respektive 30ŝ., 30ŝ., kaj 4 pundoj. — Doctor C. J. Caldera, 91 Smyth Road, Nedlands, W.A.

GEORGES SALAN

Laŭ "Sennaciulo" tiu elstara politika persono "havis la SAT-matrikulon 3905." Li oponis al Lanti dum la SAT-krizo en 1930-31.

KOMPLEZU SKRIBI AL MI!

Joseph Hegedus, 21 Highbury, Newcastle 2, England, petas belajn, kolorajn bildkartojn por sia kolekto, kun kelkaj skriblinioj Esperante el Aŭstralio.

MALLONGIGOJ

En ĉiu jaro depost 1950 oni trovas en la Jarlibro de U.E.A. liston de mallongigoj uzataj en la Esperanta movado. Tial, neniu E-isto rajtas plendi pri nekompreno de la formoj en tiu tabelo, ĉar adepto vere serioza certe studas la enhavon de tiu necesa gvidilo. Gazet-redaktantoj certe rajtas uzi la formojn sen hezito. Aparte rimarku: ptm. kaj atm. (Nur fina punkto.)

In 1921 Dr. Chikao Fujiwaseda voted for Esperanto at the League of Nations. Last year he was in Lisbon ex Madrid, awoke interest in academic and popular circles by his use of Esperanto.

ESPERANTO IN COMMERCE

Several years ago our firm decided to experiment with Esperanto. Today it can be said that the experiment has been a complete success. Almost all our foreign representatives now understand Esperanto. Employing it, we have had no misunderstanding of any kind. It is clear, logical and easy to use.

Especially in oral communications we have found our tasks lightened. Visitors to Crailsheim or to foreign countries—not only those proficient in languages, but also staff members after a single course of Esperanto—have always been able to converse with those of other idioms.

Routine communications we hitherto have published in many languages. This was a waste of time and involved much duplication of labor. Using Esperanto we have been able to dispense with other languages, and now print all communications in one language only. The work of dictation and exchange of telephone messages, because of the clarity and euphony of Esperanto, is easy and free from error.

If Esperanto were used generally on the labels of packed ware it would indicate clearly anywhere in the world the instructions for use of the articles.

For Europe, it seems to me, Esperanto has a unique significance, because at present a world language can be only European; in one or two decades non-European peoples may create their own international language, composed largely of roots from Asian and African languages. But Esperanto, as "High European", is for non-Europeans a bridge to European culture and languages.

I was one of those who, possessing well or tolerably several tongues, regarded Esperanto with mistrust. My experience, together with that of my four boys and of other persons, has been that to learn Esperanto in no wise hinders the learning of other languages, but on the contrary significantly aids in this.—Bruno Vogelmann: Chemische Fabrik Crailsheim, Germany (translated).

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

No. 31 (111)

MELBURNO

Nov. - Dec., 1962

STANFORD SCHOLAR PROBES LANGUAGE PROBLEM

Points for Philology to Ponder.

Professor Albert Guerard, author of "A Short History of the International Language Movement" (1922), leans to one of the more "naturalistic" projects. His comment, however, merits wide notice, particularly by academic circles.

In "The France of Tomorrow" (1942) he says: The international language has gone beyond the Utopian stage; there is a science of interlinguistics. For some time now the subject has engaged the attention of scholars, among them Meillet, Sapir, Vendryes and Jespersen.

The waste and weariness of language diversity becomes more depressing. Every patios, every minor tongue, demands official status. There is no world tendency towards unification of languages—no concentration in the linguistic field analogous to the concentration of wealth prophesied by Marx. On the contrary, there is a vast proliferation of idioms, and our technical triumphs, while abolishing distance, are accentuating the curse of Babel.

One language, one only, should be adopted for international communication—not to supplant the national tongues, but to save their historical and essential character. At present they are subject to a double threat: the minor ones struggle against extinction; the major against disintegration when imposed on men of alien tradition.

Hence it would not be desirable to adopt any national tongue for international use even if it were feasible. The world will ever revolt against any bid for universal supremacy on the part of a big-power language. If it were impossible to devise a neutral auxiliary language we should adopt, not English or German, but a tongue free from the taint of "supremacy", say Maltese or Catalan. But such an idiom would have to be recast and expanded enormously to be made a vehicle of our complex civilisation. "International Maltese" would no longer be historical Maltese but an artificial language with a Maltese framework. As for a Latin or Greek, they would have to be sweepingly modernised in a way to make scholars wince.

A language mainly neo-Latin in its vocabulary, analytical in its structure, as simple as English in its grammar, free from puzzling idioms and arbitrary exceptions, would be no more artificial than incubator chickens; man uses the materials provided by Nature and submits them to a rationalised natural process.

Esperanto is a neo-Latin and natural tongue, with only a few incongruous elements. It has retained for over half a century (now three-quarters—Editor) a strange power of life. It fascinates, and is loved and hated as only a living thing can be.

Zamenhof followed more definitely than Schleyer (Volapuk) the rules that now guide all interlinguists, and he was unique among language-makers for a miraculous combination of idealism and common sense. On the one hand he formulated "la interna ideo", that burning faith in human brotherhood that remains our hope. On the other, he established the policy that has made Esperanto the one decisive experiment among so many stillborn projects. Agree once for all on a few essentials, then, instead of constantly "improving" it, use the language for all its worth. So Esperanto retained its early blemishes, but proved its unity and continuity in fifty countries over fifty years. With the confidence created by this enforced stability, Esperanto has been used in hundreds of magazines and books. The Bible has been available in Esperanto since 1926; parts of Virgil, Goethe, Ibsen and much of Shakespeare have been rendered apart from much general literature. Zamenhof wanted to keep the language unchanged in essentials in order to keep it working. In this he was successful. To the present day Esperanto offers a solution which, despite imperfections, is acceptable. And it has the enormous advantage of being absolutely ready.

★ ★ ★

The above was written over 20 years ago, and must be read in that light. There is evidence that philology is moving to a recognition of the validity of interlinguistics as a branch of related study. Guerard today could add Dante, Heine, Baudelaire and others to the names in literature. Thirteen of Shakespeare's plays have been translated into Esp-o, and two others are ready for publication.

Prof. Mario Pei, in his "One Language for the World . . ." (1960) echoes Guerard's fancy concerning adoption of a minor tongue as auxiliary. Pei suggests in principle the expendability of a generation and reliance on teaching some chosen national or planned language to the children of the world. Adults wishing to learn it could, of course, have instruction. The language would be chosen under the aegis of the U.N. It need not be easy, since for chil-

dren no language is difficult before they are ten, though a simple, phonetic, regular tongue would be preferable, certainly for the tens of thousands of teachers who must be perfect in it beforehand. All very well, but what of the millions of adults who right now could use an international idiom in their present callings? Can the world wait for a generation to pass in our rapidly moving age? Let us continue to build up the strength and significance of Esperanto throughout the world and so be able to present in the hour of election a fait accompli of such proportions that its claims are paramount and undeniable.—F.R.B.

Footnote: There is an Esperanto Club at Harvard Uni., Massachusetts (Heroldo de Esp., 1 April, 1962).

TRA LA JARCENTOJ

Sir John Pollock (nask. 1878) en sia biografio "Time's Chariot" (la ĉaro de l'tempo) — 1950 — rakontas, ke li aŭdis la sekvantan pere de la viro koncernita:

Kiam juna viro, tiu estis ataseo ĉe la Brita ambasadorejo en Parizo. Ĉe manĝotablo li sidis apud maljuna sinjorino, kiu diris al li: "Kiel mia edzo diris al Ludoviko la Dekkvara. . . ." Li pensis, ke ŝi estas iom frenezeta, tamen poste li sciigis, ke, per sia unua nupto, ŝi fariĝis la edzino de la Duko de Liancourt-Rochefoucauld. Tiu viro naskiĝis en 1700, enoficiĝis kiel persona servknabo al la jam maljuna monarko, kaj en 1787 prenis kiel edzinon — knabinon nur deksepjaran, kiu, kiel jam vidite, ankoraŭ ĝuis la vivon en la mezo de la 19a jarcento!

Komentis Pollock: "Mi do parolis al viro, kiu konis la vidvinon de kortegano servinta reĝon, kiu naskiĝis en 1638!"

PRESS AND ESPERANTO

Kiam vizitas nian klubon pli-malpli elstara E-isto, kiu malmulte parolas la Anglan, ni instigu lin aŭ ŝin fari observon pri aferoj taŭgaj por la gazetaro. Nomskribita de la koncernato kun adreso por eventuala kontakto, tiu komento estu liverita al ĵurnalo por publiko en babila rubriko. La per-Esperanta rimarkindeco, kune kun ĝenerala atentindeco de la rimarkoj, preskaŭ certe garantias akcepton ĉe ĵurnalcentroj.

Australia Kroniko

SYDNEY (10 Sep. - 12 Nov.). Pluraj anoj montris lumbildojn: F-ino M. Hocking pri sia vojaĝo al Eŭropo (10/9); S-ro W. Amies pri Budapeŝto (8/10); kaj S-ro Thomas pri sia vojaĝo tra Sovetio kaj diversaj aziaj landoj (12/11). S-ino M. Duncan parolis pri sia rapidega ferio al Anglujo, montris lumbildojn, kaj disaŭdigis sonbende anglajn Esperantistojn, en longa sed ĝuinda programo (24/9). S-ro V. Gueltling dufoje parolis pri "Mondnovajoj laŭ mia vidpunkto", preskaŭ tute pri sano (1/10, 5/11). S-ro F. Dunn parolis pri "Ĉu eblas traduki la songojn?" (15/10). Pli ĝeneralaj programoj estis: Amuzvespero (3/11); Forumo (22/10); Paroladetoj de la anoj (22/10); kaj Poezia vespero, kiam 11 anoj triumfe deklamis (17/9). Tre sukcesa estis pikniko al kaj preter Nacia Parko, Audley, kiun partoprenis ĉirkaŭ 30 personoj (14/10). La marbordaj vindindaĵoj kaj la indiĝenaj floroj laŭlonge de la vojoj sufiĉe kompensis la multan vojaĝon.

(19 Nov. - 28 Jan.): S-ro F. Mueller-Soraŭ dufoje prelegis, unue (19/11) pri "Vojaĝo tra la moderna Esperanta literaturo", kaj due (21/9) pri "Vojo al sano kaj feliĉo" per dieto. Vojaĝanta angla Esperantisto, S-ro Dodson, trapasante Sidnejon, montris al ni siajn kolorfilmojn pri universalaj kongresoj kaj similaj aferoj (26/11). S-ro V. Gueltling organizis programon "Vivanta leksikono" (3/12). S-ro V. Bourlin montris kaj priparolis siajn lumbildojn pri aŭstraliaj pejzaĝoj kaj pri siaj propraj pentraĵoj kaj konstruaĵoj (10/12). Dum Zamenhof-vespero (15/12) oni kantis, muzikis, deklamis, ludis teatraĵojn, kaj S-ro V. Rutland festparoladis anglalingve, al kontenta ĉeestantaro. S-ro F. Dunn parolis pri "Spertoj el la vivo: homoj ordinaraĵ sed memorindaj" (17/12). En programo pri la internaciaj organizaĵoj de Esperanto (7/1), S-ro J. Matasin parolis pri U.E.A. kaj S-ro V. Gueltling pri S.A.T. Dum letervespero (14/1) anoj parolis pri sia korespondado, legis el leteroj, diskutis planojn, spertojn kaj problemojn. En programo pri Aŭstralia Tago

(28/1), S-ro T. Elliott priskribis la vojaĝon de la Unua Floto al Aŭstralio, kaj S-ro F. Dunn diskutis la kialojn kaj preparojn de la ekspedicio.

Sur la ekonomia fronto, Ges-oj Matasin organizis tielnomatan "Super Party" (23/11) por helpi al U.E.A.; kaj S-inoj Parker, Morrison, kaj aliaj organizis sukcesan foireton (8/12), kiu gajnis pli ol £50 por la klubo kaso anemiiginta. Ĉe la jarkunveno oni elektis: Prez.: J. Matasin; Sek-io: F. Dunn; Dua sek-io: Margaret Hocking; Kasisto: T. Elliott. Kaj aliajn.—F. M. Dunn.

ORIENT - MELBURNO

En Feb. 1962 fondiĝis Esperanto-Klubo de Orientaj Antaŭurboj de Melburno, kiu fariĝis samtempe branĉo de la Internacia Geografa Asocio (Aŭstralia sekcio). Komenciĝis E-kurso por komencantoj, al kiu aliĝis loĝantoj en diversaj antaŭurboj, kiel Mt. Waverley, Syndal, Oakleigh, Ashwood kaj Canterbury. Krom la ĉiusemajnaj lecionoj, klubanoj renkontiĝis unufoje en ĉiu monato ĉe societaj vesperoj en unu el la hejmoj de membroj, kie okazis paroladoj de gastoj, filmprezentoj, komunaj kantadoj, ludoj kaj—finiĝe—trinko.

La klubanoj decidis aranĝi Esperanto-Semajnon dum la libertempo, por daŭrigi la agadon. Sekve, ni luis duetaĝan domon en Rosebud West—"Tootgarook"—kaj dum 5-12 Jan. 1963 ni loĝis, kune preparis manĝon, ekskursis, faris paroladojn pri geografiaj aferoj, kaj gvidis du kursojn (ĉiutage matene, komencantoj; vespere, progresantoj). Partoprenis 20 homoj, kaj vizitantoj venis por unu aŭ du tagoj. La Semajno fariĝis granda sukceso, do ni ripetos tiun eksperimenton, konstatinte, ke komunage oni povas atingi bonajn rezultatojn. La plejparto de la okazoj estis filmita en koloro, kaj ni esperas, ke baldaŭ ni montros la filmon.

Jen la gvidantoj de la kvar laborpartoj: (1) E-kursoj kaj filmado: S-no Irene Fink. (2) Societaj vesperoj: S-no Margaret Saunders. (3) Financa: S-no B. Smith. (4) Manĝo: S-no E. Stafford. Krome, ĉiu partoprenanto volonte helpis por atingi la senduban sukceson.—Irene Fink.

EDMOND PRIVAT

Nigre randitaj anoncoj en la gazet-oj de Esperantujo raportas la morton, la 28-an de aŭgusto, de Profesoro Edmond Privat, pioniro, aŭtoro kaj oratoro de nia movado.

Multaj priploras la forpason de la verkinto de "Vivo de Zamenhof", de "Karlo", de "Historio de Esperanto". Lia "Junaga Verkaro" antaŭspegulis brilan maturan verkadon de pli mal-fruaj jaroj. Ni ĝojas, ke ni povas relegi tiujn simplajn sed kortuŝajn librojn.

Aliaj rememoros liajn prelegojn en la kadro de universalaĵ kongresoj—tiun oran voĉon, tiun oratoran stilon. Ni ĝojas, ke liaj paroladoj estos ankoraŭ aŭdeblaj dank'al diskoj kaj sonbendoj.

Oni ankaŭ dankeme pripensas la klopodojn de Edmond Privat, fidela Kvakero, por paco, por interkompreno de popoloj, kaj por sennombraj aliaj idealistaj celoj. "Feliĉaj estas la pacamantoj, ĉar oni nomos ilin filoj de Dio".

Miloj, kiel mi, ploras ĉar ni perdis amikon. Vere li havis en alta grado la talenton doni amikecon. Kiam mi loĝis en Genevo (1953-56) Profesoro Privat estis jam maljuna, sed li fidele ĉeestis la jarkunvenojn de la Svisa Esperanto Societo, kaj la Zamenhof-festojn de la Klubo "La Stelo" en Genevo. Kiam ni prezentis la filmon "Aŭstralio Hodiaŭ" en la Palaco de la Nacioj, Profesoro Privat ĉeestis. Kiam ni deziris varbi lernantojn, li kvazaŭ mirakle aperis. Li regule prelegis per la Svisa Radio.

Du okazojn mi speciale rememoras. Unu tagon oni telefonis por sciigi, ke Profesoro Privat prelegos posttagmeze al la geknaboj en la Internacia Lernejo. Mi haltigis mian laboron kaj rapidis al la lernejo. Estis neforgesebla sperto, aŭskulti tiun majstran alvokon, kiu pontis la kvindek jarojn inter la knabe entuziasma profesoro kaj la plenaĝe seriozaj infanoj. Poste la tuta auskultantaro deziris tuj lerni Esperanton!

La dua okazo estis kiam mi vizitis gesinjorojn Privat en ilia hejmo en Neuchatel. Mi kunportis magnetofonon, car mi deziris registri tiun karan voĉon. Mi petis, ke li legu paĝon el "Vivo de Zamenhof", sed li ridete rifuzis tion fari . . . li preferis paroli al siaj amikoj en Aŭstralio el

la koro. Tiam senhezite li registris dum kvaronhoro vere juvelan ekzemplon de la oratora arto.

Tia estis Edmond Privat, amiko de la homaro. Tial liaj amikoj en Aŭstralio funebrias, kaj kondolencas lian familion.—Ralph Harry.

"Prof. Privat. . . kiu plej profunde enkorpgis la esperantistajn idealojn kaj vivis laŭ ili . . . Li estis, post D-ro Zamenhof, la plej alta morala aŭtoritato, akceptita de la tuta esperantistaro".—"Heroldo de E."

LA MISTERA MANUSKRIPTO

D-ro E. Privat, nia funebrata amiko, deponis la "lastan konfeson" de Zamenhof, naŭpaĝan manuskripton, ĉe la Esperanto Muzeo en Vieno. Sur p. 103 de la eldono Hirt (1923) kaj p. 198 de la eldono de la B.E.A. (1920) ni legas, ke ĝi estas "kvarpaĝa". Sur la koverto Privat skribis: "M.S. de Zamenhof pri lingvaj aferoj trovitaj sur lia skribotablo post morto 1917". Ĉu vere pri "lingvaj aferoj"? Espereble oni publikigos la plenan tekston. Vidu The Australian E-ist, 5/61; 1/62.

ECHO

". . . Sat., 18th Dec., 1920—Last sitting of the Assembly. A Swiss, called Privat, brought up a proposal that Esperanto should be the language of the League. He made a speech in it. Violent protest from Hanotaux. . ."

—"Laughing Diplomat" (Daniele Vare).

TOKYO OLYMPIAD, 1964

Esperanto organisations in Japan are striving to prepare numbers of Esperanto-speaking helpers for the coming Games, and world-over efforts are being made to see that as many as possible of those going to the Japanese capital for this event have a working knowledge of the language. The central office of Esperanto in Rotterdam has issued a special call in this respect.

By new decree Esperanto is an optional subject in Danish schools; more and more children are learning it.

Youth hostels are well organised, and Esperanto is recognised by the administration: Vesterbrogade 35, Copenhagen 5. Ask for Esperanto folder.

AKADEMIO DE ESPERANTO

Unua Baloto: Collinson 32; Setala 30; Cseh, Kalocsay 27; Stop-Bowitz 26; Solzbacher 25; Bokarev, Szilagyi 24; Butler 23; Lippmann 22; Albault 20; Bugge - Paulsen 21; Vilborg, Stamatiadis 19; Hodakowski, Wong Kenn 18; Auld, De Hoog, Nakamura, Rosbach 17; Domingues, Rossetti 16; Pumpr, Gregor, Boulton 15; Atanasov, Downes, Sevak 14; Banham 13; Porto C. Neto 11; Veršinin 10; Sekelj, Minnaja, Conterno, Berger 9; Thomson 5.

Elektita: ĉiu ricevinta 18 aŭ pli.

Rebaloto: Pumpr 17; De Hoog, Nakamura 15; Domingues, Rosbach 13; Gregor 9; Berger 7; Auld, Downes 6; C. N. Porto, Sevak, Rossetti 5; Atanasov 4; Boulton, Conterno, Sekelj, Minnaja 3; Banham, Thomson, Veršinin 1.

Elektiĝis: la 5 kandidatoj, kiuj ricevis la plej grandajn nombrojn da voĉoj: Pumpr; De Hoog, Nakamura; Domingues, Rosbach.

EKZAMENOJ A.E.A.

Supera Diplomo kun laŭdo: S-ino Fay Koppel (Viktorio). Supera Diplomo: S-ro C. W. Dean (Okcidenta Aŭstralio).

BALDAU APEROS LA NEELDONITA VERKO DE D-RO L. L. ZAMENHOF

La 4-a volumo de la zamenhofa traduko de la "Fabeloj" de H. C. Andersen, kiu, pro militaj kaŭzoj, restis ĝis nun neeldonita, aperos en februaro 1963.

La libro enhavas 24 fabelojn de la fama dana verkisto. Ĝi ampleksos supezeble 224 paĝojn kaj estos ilustrita per 50 artaj desegnaĵoj speciale faritaj por la Esperanto-eldono de unu el la plej elstaraj polaj nuntempaj artistoj, A. Uniechowski. La "Fabeloj" de Andersen estas eldonaĵo de "Heroldo de Esperanto", 13 rue de la Reinette/Pijppelingstraat, Brussels 1.

STRANGA AFERO

M. Emile Boirac, rektoro de la Akademio de Dijon, ankaŭ fama E-isto, petis al D-ro Osty doni al li faktan ateston pri la psika kapablo de telepatia sensivemulo, S-ino Morel. Osty do demandis al Boirac, ĉu li posedas ian objekton apartenantan al alia persono? Boirac jesis, enmanigante al Osty lernlibron E-an. Osty atestas: "Tute nesciante pri la persono al kiu la libro apartenis, mi metis ĝin en la manojn de S-ino Morel, hipnotigita, kaj petis ŝin paroli pri la vivo de la homo al kiu ĝi apartenis. Si diris: 'Juna viro aperas antaŭ mi. Altkreska, iom nedike konstruita. Nenio r.markinde karakteriza krom liaj okuloj, kiuj nesamas ol tiuj de ordinaraj homoj. Ili havas aparte rimarkindan formon. Mi vidas lin dum longe restantan en loko sendanĝera. Li estas tie kun multaj aliaj. Unu tagon li matene foriras kun aliaj . . . longa marŝo . . . tiam poste en trajno. Mi vidas lin en ia tertruo . . . li tie staras kun brilaj okuloj . . . mi aŭdas multan bruon . . . vidas furiozon en lia cerbo; li supreniras. Kia bruego! Li sentas baton, falas . . . stariĝas . . . ree ricevas baton, denove falas kun aliaj sur vojon . . . unuflanke mi vidas herbon kaj kultivteron, aliflanke grizan koton. Li estas vundita ĉe la gorgo kaj kapo per ĉerpeco'."

Tiam sekvas priskribo, kiel oni lin forportis mortantan, kaj pri la loko, kie oni kuŝigis lian kadavron. Post du tagoj tiu priskribo atingis Rektoron Boirac, kiu jene respondis: "La lernlibro, kiun mi donis al vi, estis prenita el la civitana vesto lasita ĉe mia hejmo de la filo de mia amiko. Tiu junulo estis poste dua leŭtenanto en la 27a regimento, kaj estis mortigita aŭ perdita Dec. 12 je tranĉeatako ĉe la Bois-Brule. G.M. aĝa 25-26, altkreska, nedika, vizaĝo iom longa, palpebroj havis iom da faldo simile al Ĉinoj, homo serioza, kvietmiena . . . Kiom oni scias, li estis vundita ĉefante atakon, sed daŭrigis instigi siajn soldatojn, tiam falis ĉerande de Germana tranĉeo ankoraŭ defendata de la malamiko. La unua vundo ŝajne trafis lian ŝultron; la dua lian kapon. La kadavron supozinde la Germanoj enterigis, sed pri tio povas esti dubo. Oni registris lin "netrovita". La vizio do estas laŭfakta . . . La

libreto estis tuŝita de G.M. (la mortinto) kelkajn monatojn antaŭ la sceno, kiun ĝi rezultigis". (Ĝi restis ĉe Boirac dum la junulo trapasis la lastajn etapojn de sia vivo.)

Bibliografio: D-ro Osty: *Super-normaj Kapabloj de la Homo—Super-normal Qualities in Man*: Methuen (1923). *The Imprisoned Splendour—La Katenita Superbeco*: Rayner Johnson.

ESPERANTO EN KOMERCO

"Mi estis agrable surprizita, kiam mi legis vian artikolon sur p. 196. Ĉu vi volus akcepti disvendadon de mia libro por Aŭstralio?"—Bruno Vogelmann, Crailsheim.

"Esperanto en Komercio": 105 p., broŝ. 1.50 Gm. plus afranko. 1.20 Gm. po libro, por mendantoj de pli ol kvin.

Enhavo: Antaŭparolo de direktoro Wensing (Philips Eindhoven); 80 raportoj de firmoj pri uzo de Esperanto en iliaj komercaj rilatoj.

KUBO

En letero al Brisbana sam-ino Raul J. Seden, Ap. 570, Camaguey, Kubo, skribis: ke li penas restarigi la E-societon, kiu antaŭ 30-40 jaroj estis utila faktoro, havante tiam plurajn delegitojn de UEA. Lia patro estis del. en Camaguey. Pro malfacila politika situacio la movado disfalis. Nun pro pli favoraj cirkonstancoj por E-o en Kubo, inter ili vekigo de lingvolernemo pro kreskantaj kontaktoj kun aliaj landoj, S-ro Seden espereme diskonigas E-on kaj nun instruas kvar junulojn. Li invitas leterojn kaj promesas informojn pri sia lando.

TIU ĈI

Ho, se nur la E-istoj studus la Lingvajn Respondojn de Zamenhof! Se ili tion farus, ili ne konstante pekus en simplaj aferoj. "La uzado de streketo inter la montra vorto kaj ĉi (t.e. skribado **tiu-ĉi** aŭ **ĉi-tiu** anstataŭ **tiu ĉi** aŭ **ĉi tiu**) ŝajnas al mi nur simpla erara kutimo, kiun nenie pravigas".

Recenzoj

SPECIMENE: Henri Baupierre. Eldonis Stafeto (J. Regulo): 100 paĝoj. 1½ Us. dol.

Elstare atentinda kompilo de homo, kiu "aliĝis al la movado en Decembro, 1958". Post "unumonata ferio en Esperanta biblioteko" li sprite parodiis dekojn de E-eminentuloj, jam de Cart ĝis Regulo, bonhumore mokante ilian "amatajn ĉevaletojn", se ne paroli pri iliaj fikso-ideoj. La fruktoj de lia amuza laboro evidentiĝas kapablon pli-malpli ĝuste respeguli la mensomondojn de tre diversaj verkadepoj.

Serĉoj ofte enhavas elementon de observo penetra, sobra indiko al vero; lia imagoriĉa plumo iufoje donas formon al pensoj kaj dirvoloj, kiujn ni senmire atendus aŭdi de la koncernataj verkuloj mem. Ekzemple, ĉe Azorin, Sturmer, Regulo. Aliaj skizoj estas pli karikaturnaj. Ĉiuj ridigas, krom la relative sobraj paĝoj pri Regulo. La peco pri Stojan fortesprime plidrastigas la konatan males-timon de tiu Ruso al la Lingva Akademio. Por ŝokon eviti, ni ne volas citi.

Baupierre lerte vortmodiĝas ĉe titoloj: Sennociismo, Ronĝe sub Pom-arbo; Stranga Herezajo; Lingva Koitato, Lingva Kakademio. . . .

Iam oni provetis uzi "ĉapelino", por signifi "ĉapelo de virino". Simile B. uzas "gantino", ankaŭ "ingino". Specimene: "Ni povus senbalastigi la belan sekson de parazitaj sufiksoj: junulo — junino; belulo — belino; aspirulo — aspirino; vagulo — vag. . ." (Legante tion, oni revoku en memoron, ke iu Akademiano ludis kun ideo, uzi "virgino" anstataŭ "virgolino".)

Li ludas kun facila stilformo okaza ĉe Marjorie Boulton: Al Mia Kato:—Tra la salono vi jus pasis, sed vi ne estas hermetika, vi flakon sub divano lasis. Konfesu do, fi, kato lika!

Recenzistoj, ne plu nomu verkiston neimitebla!

Ni varme rekomendas la verkon.

Planlingvaj Problemoj (Esperanto kaj la naturalismo): William Gilbert: Stafeto eldonis. 100 p. Unu Us. dol.

Ne multaj E-istoj okupiĝas pri aliaj planlingvoj, ĉar ili havas stabilan,

praktike kaj facile uzeblan lingvon, kaj cetere scias, ke, konsidere al hipotezaj, teoriaj plibonigoj, oni ne rajtas enkonduki reformojn. Sur la propaganda tereno kuŝas la sola praktika utilo de komparaj studoj; ni povu rebati argumentojn de la naturalisma skolo.

Verkis ĉi studon eks-Occidentalisto eminenta, kiu aliĝis al E-o en 1950. Li objektive kritikis Occ., kies adeptoj li estis dum multaj jaroj. Li flugrigarde mencias fruajn projektojn jam de 1868, donas kelkajn vortojn pri Ido kaj Interlingua (I.A.L.A.); sed ĉefe lin okupas la tasko, evidentigi la superecon de Esperanto al Occidental en ĉiuj punktoj.

Trafe li observas, ke neniu planlingvo, kiu baziĝis sur ekzistantaj naciaj lingvoj, povas esti egale facila por ĉiuj popoloj, sed planlingvo pure latinida tro ekskluzive privilegias la grandajn okcidentajn naciojn kaj ne meritas la epiteton "neŭtrala". Tio eble sufiĉas, por klarigi la sukceson de E. kaj la morto aŭ vegetado de la konkurantaj projektoj.

Troviĝas ankaŭ gramatika komparotabelo de Occidental kaj Interlingua.

62, 66: (ĝi) nenion povas. La Plena Gramatiko: "post POVI ĉiam sekvas infinitivo". Ĉu vere? 69: ((ĝi) estas tiom pli facila, ke (legu: ĉar) ĝiaj reguloj estas pli simplaj. 71: Facileco estas la ĉefa kvalito, kiun I.L. devas posedi. (Sed poste): Klareco kaj precizeco estas tiel necesaj . . . kiel facileco. Do tri "ĉefaj" kvalitoj? Lama logiko.

D-ro W. Manders (aŭtoro de "Kvin Planlingvoj") antaŭparolas enkonduke al ĉi tiu tre scidona verketo.

VORTLIBROJ

Granda Vortaro Esperanto-Franca: Prof-o G. Waringhien. 370 grandaj paĝoj. 98 steloj. Treege valora kaj ampleksa.

Vortaro Franca-Esperanta: Leger & Albault. Tre moderna kaj kompleta. 700 paĝoj. 60 steloj. Ambaŭ mendeblaj ĉe: M. P. Delaire, 9 bis, Rue du Cdt-de-Poli, Orleans (Loiret), France.

Woerter der Gegenwart (vortoj nuntempaj): H. Wingen. 56 paĝoj. 3.90 DM. Esperanto Verlag, Postfach 180, Limburger/Lahn, Germany. Ĝi ne estas faka vortaro; ĝi elektis vortojn kaj esprimojn pro ilia aktualeco en

la komuna lingvo. Tre utila, precipe por German-legantoj.

COMMONWEALTH?

En la Jarlibro de UEA dua parto 1962 iu tradukis ĝin per "Respublika". Nebone, ĉar, almenaŭ formale, Aŭstralio apartenas al konstitucia monarkio.

La dua difino en "The Edinburgh" aplikeblas nur al la Commonwealth de Cromwell ("respubliko"). Millidge donas Commonwealth sub "civit" kaj "soci", do ne helpas pri nia problemo. "Komunriĉaĵo" ne estas taŭga, ĉar la riĉaĵoj ne estas komune posedataj. Haefker ("Jarmiloj Pases", p. 352) uzis "komunprosperajo", t.e. respubliko, por nomi la periodon de Cromwell. Ankaŭ tiu nomo ne estas tre celtrafa.

Pri Aŭstralio oni povus diri: "la ŝtatoj federaciigis, sub formo de unu superŝtato — **The Commonwealth of Australia**, tamen ankoraŭ retenante lokan autonomion". "Federacio", estas la oficiala formo, sed "federo" estas listita de Edinburgh kaj Waringhien (E.-Fr vortaro) kiel permesata. Ĉu do Aŭstralianoj senhezite uzadu "la Aŭstralia ŝtatfedero" por "Commonwealth"?

Por traduki "The (British) Commonwealth (of Nations)" ŝajnas bona: La Libere Aliginta Stataro.

Laŭ teksto de La Voĉo de Ameriko (21 Okt. 1961): "Puerto Rico estas Libera Aliginta Stato — Hispane: Estado Libre Asociado. Angle: Commonwealth."

Estas nur juste atentigi, ke la du difinoj de "respubliko" konformas al la idealo, eble ankaŭ la fakto, kiom koncernas Aŭstralion kaj Britujon. La difinoj ne ekskludas ekziston de monarko. (Ni citas laŭ Plena Vortaro.)

KORESPONDADO

En Esperanto kaj la Angla: ĉefkontoristo Yngve Borjeson, Fridhemsgaten 25, Sundsvall 3, Sweden.

S-ino Stoĉjo C. Shoshkov, prez. de laborkoopera agrikultura mastrumo v. Borima, Lovesko, Bulgaria, nepre respondos.

STUDY OF LANGUAGES

Mr. C. Watters, M.A., erstwhile chairman of the Incorporated Assn. of Head Masters, in his address on retirement, said: "For many of our pupils the study of the literature of their own country gives all that they need and will be capable of appreciating, and for them the results of several years' grappling with the intricacies of a foreign tongue do not seem to justify the amount of time spent in this way. For the purposes of everyday oral and written communication it might be profitable for all our pupils to begin by learning some artificial language without any of those wearisome exceptions and irregularities. This would allow those with little aptitude in this direction to acquire a modicum of skill for purely utilitarian purposes and give those who were going to proceed to further study some background of knowledge of the structure of a language."

★ ★ ★

Prof. V. Georgiev, vice-president of the Bulgarian Science Academy, states: "Esperanto is undoubtedly necessary, and I am a fervent supporter of it. At the International Congress of Linguists in Paris in 1948 I spoke for its being taught alongside with other languages. I was supported by Soviet, French, Italian and other linguists". (Interview in "Nuntempa Bulgario" 7/8/1962.)

★ ★ ★

The Institute for Modern Philology, National Littoral University Rocario (Argentina) includes Esperanto as an official subject.

★ ★ ★

Dr. Jef Last toured Portugal. "Of those whom we tried to contact, at the most five in a hundred knew French, two English and one Spanish. So it was next to impossible to get into close touch with ordinary people" (These four items, from "The Worker Esperantist".)

Letervespero en la unua de Majo. Bv. sendi salutojn al J. Kulkus, tr. Rude Armady 3, Sumperk, Czechoslovakia. Ĉiu certe ricevos respondon.

LANGUAGE LEARNING

"Many of the pleas that have to do with 'cultural tradition' or 'background', as advanced by teachers of languages, who are by no means disinterested parties, have little or no justification. Educational experience shows this; both for students and, alas, sometimes also for instructors, motivation is weak and results poor. Those who are convinced that to learn at least one ancient or modern language is a valuable educational experience—with a good teacher, who knows his business, it may be a major experience—should see to it that the experience is initiated for at least four years, and that it is given a fitting amount of time in the weekly time-schedule

" . . . to say that no one can call himself educated without learning a foreign language is not true. Which of us does not know more than one man or woman of deep and genuine mental and moral cultivation and development who has no language but his mother tongue?

"If to learn a second language is to open the mind in a manner which the Harvard report on General Education called taking a Copernican step, then there is implied a control and a penetration of the structure of the second language, and of the total content of works written in it, such as to make them your own—and a few be there who do it ever, and none in two or three years' study. . . . There are other ways of escape from egocentricity to geocentricity, or learning to see man and the world as a whole, and far more pertinent than a year or two of baby French or baby German or beginner's Latin. To say that certain basic changes in a student's mind are produced by the learning of languages, and that this result can be achieved in this and no other way, is contradicted by the entire history of education, indeed by all experience."—Joshua Whatmough, Head of the Dept. of Linguistics and Professor of Comparative Philology at Harvard.

REPRESOJ

Redaktoroj havas plenan liberon represi kiun ajn aperintan en nia gazeto. Ili nur menciu la fonton.